

EL POPOLA

ĈINIO

中國舞蹈

10


1978





Altproduktaj kampoj kreitaj de la maŭtian-a popolo


Nova Fizionomio de Maŭtian



Loĝejo de komunumanoj de iu produkta taĉmento

La popolo de Maŭtian de Juejan-gubernio de Hunan-provinco multe faris akvoutiligajn konstruaĵojn, forstumadon kaj grundorefomon. Dank' al tio ĝia agrikultura produkto multe progresis. En la lastaj tri jaroj, la pomua produktokvanto de greno ĉiujare superis 500 kilogramojn kaj ankaŭ la produkto de flankokupoj ricevis rapidan disvolviĝon.

Elektrejo de
Junŝan-komunumo



Stacio de Agrikulturaj
Maŝinoj de Maŭtian





Riĉa rikolto de
silkraŭpaj kokonoj

Ŝoseo de Maŭtiar


Riĉa rikolto de eriobotrio de Ŝehian- gubernio

Plukado de
eriobotrifruktoj





En la lastaj jaroj, la eribotria produkto de Ŝhian-gubernio de Anhuĵ-provinco rapide disvolviĝis kaj la planta areo de ĝi plivastiĝis de pli ol 200 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) ĝis pli ol 2,100 muoj.



Eriobotriogardeno de Gintan-komunumo



Teknikistinoj ekzamenas kvaliton de enladigitaj eriobotri-
fruktoj.




Siropo kaj aliaj
medikamentoj fari-
taj el eriobotrioj

La somer-feria vivo de geknaboj




Snurtirado




Kiel interese!

Junpioniroj kaj la fame konata montgrimpisto Phanthog surgrimpis la pinton de la pitoreska Hiangŝan-monto de Pekino.



En mateno de la somera feria kampadejo de geknaboj



Gelelantoj de la scienco grupo en muntado de elektronika komputero.





Infanoj de la urbo Kunming ekskursas en vizitindejo.

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1978
N-ro 10
(241)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILLO:

- P. 1. Libera gimnastiko
- P. 4. Lotusa lageto



Enhavo

Salutvortoj al la 63-a UK	2
Funebro pri kamarado Guo Mojuo	3
Ĝojinda situacio de la industria kaj agrikultura produktado	8
La irigacia areo de Ninghia	12
La Hiangfan-Ĉongking-a Fervojo malfermita al trafiko	18
Goldbach-konjekto (raportajo)	20
Pro la sano de la popolo	23
Skermistino Luan Gjugie	26
Post emeritiĝo	29
Sur la stratoj de Hefej	33
AMIKECO: Amikeco sur alta neĝkovrata monto	35
KULTURAJ KONTAKTOJ: Ĉina-Aŭstralia Scienca Simpozio	39
Vizito de birmaj artistoj al Ĉinio	39
EN PEKINO: Hiangŝan-monto	41
ĈINAJ NACIECOJ: La hanoj	45
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Potala-palaco	49
INTER NI: Pri "akupresuro"	52
KALEJDOSKOPO	52
KURANTAJ AFEROJ	40, 54
ESP-NOVAĴOJ	55

Salutvortoj al la 63-a UK

Estimata sinjoro prezidanto,
Estimataj gesamideanoj,

Kun amikaj sentoj la ĉina delegacio alvenis ĉi tien por ĉeesti la 63-an Universalan Kongreson. Ni transdonas al vi, geesperantistoj el diversaj landoj, al la popolo de la gastiganta lando Bulgario, kaj al la fervoraj gesamideanoj de LKK korajn salutojn de Ĉina Esperanto-Ligo kaj la ĉina esperantistaro!



Ni esperas, ke tiu ĉi Kongreso plifirmigos la amikecon inter la esperantistoj kaj donos bonan ŝancon por in-

terŝanĝi spertojn en lernado kaj disvastigado de nia lingvo. Ni ĉinaj esperantistoj volas plifortigi niajn rilatojn kun la diverslandaj samlingvanoj en disvastigo kaj utiligo de Esperanto, kaj ni klopodos fari niajn kontribuojn tiurilate.

Ni kore deziras sukceson al la Kongreso. Dankon!

Ĝang Kiĉeng (Ĉ. Ĉen), estro de la Ĉina Esperantista Delegacio

La 30-an de julio, 1978




Gang Kiĉeng faras salutan parolon.

◁ *La reprezentantoj de diversaj landoj farontaj salutan parolon al la Kongreso*

Al la kongresejo



Funebro pri kamarado Guo Moĵuo



Guo Moĵuo

Kamarado Guo Moĵuo forpasis en Pekino je la 12-a de junio 1978 pro malsano. Li estis elstara proleta batalanto de nia kultura fronto, eminenta verkisto, poeto kaj dramisto, marksisma historiisto kaj specialisto de antikvaj ĉinaj ideografiaĵoj. Li estis alia brila standardo de la ĉina kultura fronto sub la direktado de Maŭzedongpenso, post Lusin. Krome, li donis varman subtenon al la ĉina esperanta movado. Ni publikigas la jenan artikolon de Hujucz por funebri lin.

— La Red.

En la 15-a de junio, kiam mi vizitis la templon Kajjuan de la urbo Kĵuanĝoŭ, mi trovis vervan poemon surmure skribitan de kamarado Guo Moĵuo en 1962. Jen mi citas la lastajn kvar versojn sube en mia artikolo:

.....

*De antikv' abundas fratoj en Azi', Afriko,
stariĝis jam de Tang kaj Song¹ amika ligo.
Jen tempo por repreni la insulojn Taj-Peng²
venas;
heroojn por trafendi ondojn oni jam atendas.*

En la tempo, kiam mi volis ĝin kopii tie, subite aŭdiĝis malfeliĉa informo pri forpaso de majstro Guo en la ĉefurbo. De tio mi kaj aliaj vizitantoj ĉiuj estis frapitaj stultaj.

En la lastaj jaroj, multaj kamaradoj ĉu konataj aŭ nekonataj zorgis pri la sanstato de kamarado Guo Moĵuo. Tamen nun, en la templo Kajjuan

ĉe piedo de la monto Vuĵi, mi ankoraŭ sentis ke lia forpaso estis tro abrupta. Mi ne havas sufiĉajn vortojn por esprimi la malĝojon en mia koro. De kie mi komencu mian vorton?

La forpaso de kamarado Moĵuo estas granda perdo por niaj partio kaj popolo. Li estis merita eminenta kaj elstara proleta batalanto de la kultura fronto. Li estis fama historiisto kaj ankaŭ unu el la eminentuloj kiuj kreas la modernan historion de Ĉinio kune kun centmilionoj da popolanoj.

Post la Movado de la Kvara de Majo kaj la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, kamarado Moĵuo turniĝis en praktikado, de juna verkisto kun romantika koloro en proletan revolucionan verkiston. Lia verkista talento estis senkompare abunda. En sesdek jaroj, li senĉese verkis multe da poemoj, teatraĵoj, noveloj kaj prozoj, studis la antikvan socion de Ĉinio, arkeo-



Prezidanto Maŭ kaj
kamarado Guo
Mojuo en 1954


logion, historion, antikvajn ĉinajn ideografiajn kaj kaligrafion. Ankaŭ pri la reformado de la skribado de ĉina lingvo li havis sian rimarkindan ideon. Li opiniis ke tiu reformado estas neevitebla, oni devas ne nur latinigi la skribadon, sed ankaŭ malpliigi la nombron de ĉinaj ideografiaj. Tiu opinio estas tute diferenca de la ideo sole simpligi la ideografiajn sen latinigo de la skribado. Li senlace praktikis, ĝis la lasta spiro, la principojn “utiligu la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligu la fremdlandajn en servo al Ĉinio”, “floru cent floroj, aŭdigu sin cent skoloj” kaj “elvolu la novon el la malnovo”. Se ni diras ke al la revolucia kulturo Lusin donis influon ekstreme profundan, do kamarado Mojuo donis influon ekstreme vastan.

Kamarado Mojuo aktivis en ĉiuj kulturaj sferoj kaj faris diversajn akademias studojn ĉiam kun la sama celo — la proleta revolucio. Dank’ al lia diligenta studo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso senĉese disvolviĝis kaj leviĝis liaj atingoj en la kultura laboro kaj akademias studoj. Li estis fidela al la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj unu el la plej intimaj kunbatalantoj de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj. Ĝuste pro tio, li suferis, eĉ en siaj lastaj jaroj, kalumnion kaj persekuton fare de la damninda “kvarpersona bando”. Kiam Lin Biao kaj la “kvarpersona bando” tiranis, eldono de la verkoj de kamarado Mojuo kaj ankaŭ surscenigo de liaj teatraĵoj estis malpermesitaj. La “kvarpersona bando” estas efektive



Prezidanto Hua kaj kamarado Guo Mojuo en la inaŭguro de la Tutlanda Sciencita Konferenco okazigita en marto, 1978

Ĉefministro Goŭ Enlaj, Prezidanto Gu De kaj kamarado Guo Mojuo (la unua de maldekstre) en 1954



ankoraŭ pli malica ol la kuomintanga reakciularo!

Tamen la grandaj meritoj de kamarado Mojuo en la revolucia kultura afero estas neforviŝeblaj, kaj lia influo jam transpasis la landlimon. Mi ne kapablas surpaperigi ĉiujn liajn kontribuojn kaj meritojn. Ĉi tie, laŭ mia memoro mi nur prezentos kelkajn plej elstarajn aferojn.

Ni ne povas forgesi tion: En 1927, pro la dekstra oportunistama linio de Ĉen Duhio la granda revolucio malsukcesis, kaj nigra nubo kovris la ĉielon de Ĉinio. Tiam, kamarado Mojuo publikigis la artikolon "Rigardu la Hodiaŭan Ĉiang Kajŝek", en kiu li akre malkovris la intrigon de Ĉiang Kajŝek uzurpi la ŝtatpotencon por perfidi la patrion kaj multe altigis la singardemon kaj konscion de la revolucia popolo. Post tio li partoprenis en la Nanĉang-a Leviĝo gvidata de kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝu De.

Ni ne povas forgesi tion: Post la Evento de la Sepa de Julio, 1937, responde al la alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio, riskante sian vivon,

kamarado Mojuo revenis al la patrolando por partopreni en la nacisava kontraŭjapana movado. En 1938, observante la politikon de Prezidanto Maŭ pri la kontraŭjapana nacia unuecfrento kaj sub la gvidado de kamarado Ĝoŭ Enlaj, li sin okupis pri la kontraŭjapana propaganda laboro kaj organizado de revoluciaj junuloj al unuiĝo kun kaj batalo kontraŭ la kuomintanga reakciularo, laŭ la principo "agi kun praveco, avantaĝo kaj ĝusta mezuro".

Ni ne povas forgesi tion: En la regiono regata de Kuomintango tiam, kamarado Mojuo gvidis kulturajn laborantojn por efektivigi la spiriton de "La Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunvido en Jan-an" de Prezidanto Maŭ. Precipe neforgesebla estas tio ke li persone verkis la revolucian historian dramon "Kju Juan" konatan en kaj ekster Ĉinio. Tiu dramo plene malkovris la intrigon de Ĉiang Kajŝek false rezisti kontraŭ la japana agreso kaj vere kontraŭstari la Komunistan Partion, kaj certagrade mobilizis la publikan opinion por konduki la Kontraŭ-



Kamarado Guo Mojuo (la dua de maldekstre en fronto) kaj politikaj laborantoj de la Norden-Ekspedicia Armeo en 1927

japanan Rezistmiliton ĝis la fino kaj gajni la Liberigan Militon.

Ni ne povas forgesi ke post la venko de la Liberiga Milito, sub la gvidado de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kamarado Moĵuo fondis la Ĉinan Akademion de Sciencoj kaj la Tutlandan Federacion de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj, mobilizis, organizis kaj edukis intelektulojn kaj sciencajn kaj kulturajn laborantojn en- kaj eksterpartiajn por iri la vojon ruĝan en politiko kaj ekspertigan en sia fako, kaj tiamaniere antaŭenpuŝis la disvolviĝon de sciencaj kaj kulturaj aferoj de nia lando.

Ni ne povas forgesi des pli tion, ke dum la lastaj pli ol dudek jaroj post la Liberiĝo de la tuta lando, kamarado Moĵuo, kiel proparolanto de la nova Ĉinio kaj unu el la plenumantoj de la revolucia diplomatia linio de Prezidanto Maŭ, senlace vojaĝis al diversaj landoj de Azio, Afriko, Eŭropo kaj Ameriko plenumante popolan diplomation, kaj kontribuis al unuiĝo kun la tria mondo kaj starigo de la internacia unuecfronto kontraŭ imperiismo, hegemoniismo kaj koloniismo. Ĝuste pro tio, li estis ankaŭ fervora subtenanto de la Esperanto-movado de Ĉinio. La Ĉina Esperanto-Ligo kaj la revuo *El Popola Ĉinio* ambaŭ estis fonditaj dank' al subteno de kamarado Moĵuo.


La elstara proleta kultura batalanto kamarado Moĵuo forlasis nin. Lia vojo estas ĝusta vojo kiun devas iri la intelektuloj kaj sciencaj kaj kulturaj laborantoj de nia lando.

Ni nepre devas, laŭ la volo de kamarado Moĵuo, elkulturi milojn kaj dekmilojn da proletaj kulturaj batalantoj, fari kontribuojn por liberigi Tajvan, reunuigi la patrolandon kaj plenumi la ĝeneralan taskon de la nova stadio.

1. *Tang kaj Song estas nomoj de du dinastioj. Tang-dinastio regis 618-907 kaj Song-dinastio regis 960-1279.*
2. *Taj estas Tajvan kaj Peng estas Penghu. Tiuj insuloj estas teritorioj de Ĉinio kaj restas ankoraŭ liberigotaj.*



Kamarado Guo Moĵuo ekspertizas prifositajn antikvaĵojn.



Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj kamarado Guo Moĵuo kun geaktoroj de la Pekina Popola Arta Teatro en 1963



de HIAŬ DONG

EN la unua duonjaro de 1978, nia lando akiris ĝojindajn sukcesojn en la produktado industria kaj agrikultura.

La karakterizaĵoj de nia produkto dum tiu duonjaro estas tio ke diversaj entreprenoj multe okupis sin pri reordigo de la aferoj terure konfuzitaj de la “kvarpersona bando” en la pasinteco kaj pri fortigo de gvidado en la produktado, tiel ke senĉese pliboniĝis la produkta situacio. En ĉiuj frontoj estas plene energie plenumata la ĝenerala tasko en la nova disvolviĝa stadio kaj multaj gvidantaj respondeculoj profundiĝis en la bazajn unuojn por tie labori kaj mobilizi popolamasojn por efektiviĝi la modernigon de la lando.

La industrio jam radikale elturniĝis el sia embarasita pozicio kaŭzita de la “kvarpersona bando” kaj la produkto leviĝas plenumplekse. La totala produktovaloru de la industrio en la unua duonjaro de la kuranta jaro kreskis per 24.6% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta

jaro kaj la kreska mezuro de la totala produktovaloru de la plejparto el la provincoj, urbegoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando superis tiun de la pasinteco. Aparte ĝojinde estas, ke la totala produktovaloru de industrio de la provincoj Siĉuan, Gujĝoŭ, Junnan kaj Ĝegiang, kiuj tre grave suferis la detruadon de la “kvarpersona bando”, ĉiuj kreskis per pli ol 40%. Tio signifas, ke ili sufiĉe rapide restarigas sian industrian produkton.


Ankaŭ la fera-ŝtala industrio, grave detruita de la “kvarpersona bando”, rapide progresis en sia restariĝo. La produktokvantoj de ŝtalo, ŝtalaj materialoj, laminataĵoj, gisfero, fera erco kaj koakso de la tuta lando ĉiuj superis la planon por la unua duonjaro. El ili la produktokvanto de ŝtalo kreskis per 67% kaj tiu de ŝtalaj materialoj per pli ol 60% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro. Tia rapideco estas malofta en nia historio. En antaŭaj jaroj la metalurgia industrio stagnis pro la subfosado de




Laboristoj de Ŝanhajo ekzamenas tablajn komputerojn.

la “kvarpersona bando”, kaj sole por la tri jaroj de 1974 ĝis 1976 la suma deficino de ŝtalprodukto kompare kun la plano atingis 28,000,000 tunojn. Post frakaso de la “kvarpersona bando” la metalurgia industrio komencis restariĝi. Ekzemple, post plena reordigo kaj plifortigo de administra gvidado kaj per disvolvo de socialisma labor-konkurso la produktokvanto de la Anŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio kreskis senĉese kaj tiel ĝi jam superplenumis la produktan taskon por la unua duonjaro de la kuranta jaro kaj estis glorie titolita kiel Daking-tipa entrepreno*.

Je la komenco ĉi-jare la ŝtato emfazis, ke por rapidigi ekonomian disvolviĝon estas necese unue multe produkti elektroenergien, karbon kaj levi fervojan transportadon. La rezulto estas kontentiga. En la unua duonjaro termoelektra produktopovo de la tuta lando kreskis per pli ol 1,000,000 kilovattoj kaj la produktokvanto de elektro atingis 50.8% de la jara plano, kaj mez-nombra taga produktokvanto de elektro de diversaj provincoj, urbegoj kaj aŭtonomaj regionoj, precipe de la tri grandaj elektro-retoj nome Pekino-Tiangin-Tangŝan, la Nordoriento kaj



La Petrol-kemia Fabriko de Vuhan



Riĉa rikolto de akvomelono en Vuming-gubernio de Guanghi

Orienta Ĉinio, ĉiuj rompis la rekordon en la historio. La produktokvanto de nafto kreskis monato post monato kaj en la unua duonjaro ĉi-jare kreskis per 11.2% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Kaj samtempe pliaj novaj petrolaj kaj gasaj kampoj estas trovitaj kaj aro da novaj oleputoj estas borita. La produktokvanto de karbo, mezuro de enfosado, kvanto de altkvalita karbolavado estas plenumitaj antaŭdate respektive je 20, 39 kaj 26 tagoj. La tasko de fervoja transportado de la tuta lando de la unua duonjaro jam estas plene plenumita je la 17-a de junio.

Kemisterka kaj tekstila industrioj ambaŭ antaŭdate plenumis sian produktan planon de la unua duonjaro. La totala produktovaloro de malpeza industrio en la unua duonjaro kreskis per pli ol 20% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro, la specoj de la produktaĵoj plimultiĝis kaj ilia kvalito plialtiĝis ol tiuj de la pasinteco. La produktokvantoj de brakhorloĝoj, sinteza purigilo kaj lampopiroj de la tuta lando kreskis per 40% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro.

En agrikulturo, la produktokvanto de somermatura greno kreskis per 10% kompare kun tiu

Morusgardeno en Vuhi de Giangsu-provinco



de la pasinta jaro. En printempo sekeco malofta aperis en la norda parto de nia lando dum en la suda parto estas tro da pluvoj. Sed dank' al vigla disvolviĝo de la amasa movado de lerno de Daĝaj kaj efektiviĝo de la ekonomiaj politikoj en la kamparo, la vilaĝanoj frue disvolvis batalon kontraŭ trosekeco kaj pluvozo kaj tiel akiris riĉan rikolton.

La agrikultura produkto en la unua duonjaro ĉi-jare karakteriziĝis ne nur per zorgo pri printempa plugado sed ankaŭ pri fundamenta konstruado de kampoj, kaj ne nur pri grena produkto sed ankaŭ pri multflanka entreprenado. La kulturareoj kaj produktokvantoj de kolzo de la provincoj Siĉuan, Giangsu, Ĝegiang kaj Anhuj kreskis grandmezure kompare kun tiuj de la pasinta jaro. La produktokvanto de sukero de la tuta lando kreskis per 15% kompare kun tiu de la antaŭa jaro.

Atentinda en agrikulturo estas la starigo de 12 bazlokoj por komercaj grenoj, difinita en la nacia ekonomia plano proklamita de la Kvina

Tutlanda Popola Kongreso. Mekanizo efektiviĝis jam de komence en plugado de virga tero ĉe komercgrena bazloko de Hejlonggiang-provinco, kaj la areo de mekaniza semado jam okupas 60% de la totala semareo de la tuta provinco kaj kreskis per 10% kompare kun tiu de la pasinta jaro.

De ĉi-jara printempo, en nemalmultaj lokoj en la norda parto de Tianŝan-montaro de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono estas realigitaj artefaritaj pluvoj, tiel ke 330,000 hektaroj da kampoj liberiĝis de trosekeco. Samtempe kun tio ankaŭ la brutobredo de tiu aŭtonoma regiono akiris riĉan rikolton. La viv-procentoj de la pli ol 7,000,000 diversaj brutidoj naskitaj en la kuranta jaro atingis 93%. En Hami-subregiono paŝtistoj disvolvis laborkonkurson kaj la viv-procentoj de brutidoj de la tuta subregiono superis 95%.

** Pri Daking-tipa entrepreno, legu la artikolon "Bolanta Urbo de Fero kaj Stalo" en la 8-a numero de 1978.*

Laboristoj de la Ĉangĝoŭ-a Transistora Fabriko faras pakadon de integraj cirkvitoj per silikona plasto.





La irigacia areo de Kingthia

IUN fruan matenon en la lasta tagdeko de junio mi ĝoje ekveturis per trajno de Pekino al la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj tiel komencis mian longe sopiratan vojaĝon.

La regiono situas en la meza baseno de la Flava Rivero kaj limas norde kun la Mongola Popola Respubliko. Tie loĝas huj-oj, han-oj kaj aliaj, troviĝas areo irigaciata per la Flava Rivero kaj abunde produktiĝas rizo kaj tritiko.

Ĉe la kanjono Kingtonghia troviĝas la akvobaraĵo kun koneksaj konstruaĵoj. La akvo de la Flava Rivero estas tie barata kaj kondukata al la irigaciata areo, do mia vizito komenciĝis ankaŭ de tie.

Rakonto pri la kanjono Kingtonghia

En la aŭto survoje al la akvobaraĵo iu loka kadro rakontis al mi jenan legendon: Antaŭ pli

ol kvar mil jaroj, Da Ju venis al la nuna kanjono por ordigi la fluejon. Li trovis, ke montego baras la fluadon de la Flava Rivero. La montego plena de rokoj glime brilaj pro enteno de bronzo estas majeste granda. Da Ju pensis en si: Kiel bone estos, se oni dehakos ŝtonojn por ricevi bronzon kaj samtempe malfermi vojon por la rivero kaj kondukos la akvon por irigacii kampojn. Sekve, li gvidis amasojn por trahaki la montegon, kaj tiel la Flava Rivero trovis sian vojon tra la kanjono kaj ekprovizis la kampojn sur ambaŭ bordoj per sia akvo. La kanjono per tio ricevis sian nomon Kingtonghia. *Kingtong* signifas bronzon kaj *hia* signifas kanjonon.

La nomo Da Ju estis efektive registrita en nia antikva literaturo. La aŭtentikeco pri tiu lia afero ne estis konfirmita, sed tiu legendo spegulas belan revon de nia laboranta popolo pri jugado de la Flava Rivero.

Juna Vang, laboranto de la administracio de la akvobaraĵo kondukis min al la baraĵo pli ol kvardek metrojn alta. Norden rigardante sur ĝi, ni vidis senlime vastan ebenajon. La Flava Rivero fluas nordorienten tra la kluzoj de la baraĵo sub niaj piedoj. Ambaŭborde de la rivero sterniĝas Jinĉuan-ebenaĵo, la ĉefa parto de la areo irigaciata per la Flava Rivero. Ĝi longas je proksimume tricent kilometroj de la sudo ĝis la nordo kaj larĝas je proksimume kvardek kilometroj de la oriento ĝis la okcidento, limanta kun Helan-montaro okcidente kaj Erdos-altebenaĵo oriente. La tuta areo kliniĝas de sudo al nordo. Ambaŭborde antaŭ la akvobaraĵo estas konstruita po unu enfluejo. La akvo post produktado de elektro per akvoturbinaj generatoroj mem fluas en la kanalojn tra la enfluejoj. Poste la akvo plue fluas en diversajn grandajn trunkkanalojn. Juna Vang diris al ni: "Okcidente de la rivero estas kvin grandaj trunkkanaloj kaj oriente kvar, el kiuj la plej mallonga havas longecon de pli ol kvardek kilometroj kaj la plej longa de pli ol ducent kilometroj. Ili irigacias proksimume 200,000 hektarojn.

Kiam ni turnis la rigardon suden, ni vidis tute alian bildon. Du kolosaj montoj staras ambaŭflanke unu kontraŭ la alia, kaj la Flava Rivero torentas renkonte al ni. Ĝin baras alta akvobaraĵo el armaturita betono. Nun la rivero fluas laŭ la homa volo, parte en la kanalojn kaj parte en la riverliton. Mi imagas en mi: Se Da Ju, kiu sin okupis pri river-ordigado en la legendo, vidus tiun akvobaraĵon, li certe surpriziĝus.

La areo de Kingtonghia estis strategia loko, pri kiu batalis antikvaj militistoj. En la pasintaj pli ol du mil jaroj, por rezisti kontraŭ invadantoj, feŭdaj regantoj de diversaj dinastioj garnizonigis ĉi tie soldatojn, kiuj unuflanke sin okupis pri defendado kaj aliflanke pri ekspluatado de virga tero kaj fosado de kanaloj por elkonduki akvon al kulturataj kampoj ĉe la kanjono Kingtonghia. Dank' al tio la norda ebenaĵo iom post iom fariĝis riĉa produktejo de rizo kaj tritiko, same kiel sude de Jangzi-rivero, tiel ke ĝi ĝuas la belan nomon de "Riversudo en Limregiono".

Tamen, tiam ne estis akvobaraĵo ĉe la kanjono, tial oni ne povis reguligi la flukvantaron ĉe kanalkapoj. Kiam longe ne pluvis kaj la kampoj devis

esti irigaciataj, ofte pro sia malalta nivelo la akvo ne povis enflui en kanalojn, tial la agrikultura rikolto ne estis garantiata.

En la kvindekaj jaroj, sub la forta subteno de la Partio kaj la ŝtato, la registaro de la aŭtonoma regiono gvidis diversnaciecajn popolanojn por konstrui la grandiozan akvobaraĵon Kingtonghia, por ke la Flava Rivero submetiĝu al la volo de la popolo; samtempe kun tio, laŭ la unueca plano, oni faris grandskalan riparadon al malnovaj kanaloj, ilin rektigante, larĝigante kaj profundigante, kaj nove konstruis kvin grandajn trunkkanalojn, pli ol tridek grandajn drenkanalojn kaj formis novan irigacian sistemon taŭgan tiel por irigacii kiel por dreni. Rezulte la irigaciata areo pligrandiĝis al duoblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo kaj la totala grena produktokvanto de la regiono kreskis al kvaroblo.

Estinta alkala sablojo, nun fekundaj kampoj

Forlasinte la akvobaraĵon, ni veturis okcidenten al la gastejo de la gubernio Kingtonghia, situanta en Hiaŭba. Survoje, juna laboranto Hju de la gubernia oficejo montris al ni rizkampojn okcidente de la ŝoseo kaj diris: "Rigardu, tie estis plena de sablojoj kaj alkala tero en la pasinteco, sed nun ili jam fariĝis kampoj de komunumoj!"

Aŭdinte tion mi proponis viziti la lokon. La ŝoforo direktis la aŭton okcidenten. Ambaŭflanke de la vojo, kreskas smeralda rizo kaj maturiĝinta tritiko sur bonordaj longbedaj kampoj dividitaj de densaj kontraŭventaj arbvicejoj. Post veturo de sep aŭ ok kilometroj, ni haltis antaŭ granda kanalo. Okcidente de la kanalo ĉie troviĝas sablojoj. K-do Hju diris: "Tiu ĉi okcidenta trunkkanalo kun longeco de 112 km. estis fosita post la Liberiĝo, kaj nun la plejparto de sablojoj oriente de ĝi jam transformiĝis en la kampojn."

Ni iris norden laŭlonge de kanalo kaj atingis la produktan brigadon Huaŝigoŭ. Maljuna Ŝen, kadro de la brigado, fervore akompanis nin en la vizito. De li ni informiĝis, ke la pli ol ducent tieaj familioj antaŭe loĝis proksime de la akvo-

baraĵo kaj poste en 1964 transloĝiĝis ĉi tien pro tio, ke ilia hejmvilaĝo devis fariĝi parto de la akvorezervejo.

En la komenca periodo post la transloĝiĝo, en ĉi tiu loko ĉie estis sablaĵoj kaj alkala tero. La printempa vento estis tiel furioza, ke oni ofte trovis en la mateno, ke la pordo estis barita de sabloamaso alblovita dum la nokto. Pri tio iuj komunumanoj maltrankviliĝis. La partia filio organizis ilin lerni la verkon de Prezidanto Maŭ "Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo", kaj per tio firmigis ilian fidon je venko super vento kaj sablo. Ili unue plantis ĉirkaŭ la vilaĝo arbzonon kontraŭventan kaj sablofiksan. Poste ili konstruis kanalojn por enkonduki akvon, fosis drenkanaletojn por forlavi alkalon de la tero, ebenigis kampojn, plantis pli ol cent mil arbojn kaj kreis pli ol 100 hektarojn da kampoj, kiuj donas rikolton de 3,750 kilogramoj da greno por ĉiu hektaro.

Transirinte la okcidentan trunkkanalon, ni venis al granda ĝardeno en mezo de la dezerto. Maljuna Ŝen diris: "Tiun ĉi ĝardenon ampleksantan 33 hektarojn ni konstruis en la dezerto antaŭ tri jaroj, irigaciatan per levita akvo!"

Ĉirkaŭ la ĝardeno kuŝas zono de altaj poploj kaj densaj sablaj jujub-arboj, interne de kiuj kreskas legomoj, printempa tritiko, arbidoj kaj frukt-arboj de persiko, abrikoto, pomo kaj aliaj. Sub abrikotarbo plensarĝita per fruktoj, la mastro regalis min per freŝaj kaj dolĉaj abrikotoj.

Poste maljuna Ŝen kondukis nin al malgranda pumpstacio. Tie troviĝas kanalo etendiĝanta al la dezerto. Maljuna Ŝen diris: "Ĝi estas fosita ĉijare. Ni planas levi akvon el la okcidenta trunkkanalo por irigacii aliajn dekojn da hektarojn en la dezerto, kaj produktos ankoraŭ pli grandan kvanton da komerca greno por la ŝtato!"

Kultivejo sur la antaŭa lago-fundo

En la tago, kiam ni venis de Huaŝigoŭ al la urbeto Hiaŭba, ni informiĝis, ke antaŭe inter la kanaloj Tanglaj kaj Hanjan estis nombro da lagoj el akumulita akvo kun kuna longeco de pli ol 50 kilometroj. La nuna ŝtata kultivejo Lianhu sidas ĝuste en la mezo de la lagaro. Tio estas kurioza kaj mi decidis ĝin viziti.


Matene de la sekvinta tago, ni veturis al la ŝtata kultivejo. Post nelonge, ni jam eniris la teritorion de la kultivejo. Ambaŭflanke de la vojo estas verdaj kampoj de rizo kaj maizo, ore maturiĝinta tritiko kaj ia fibroplanto kun blankaj kaj violaj floretoj, kiuj ĉiuj aŭguris alian riĉrikoltan jaron. Tamen, ĉu estas imageble, ke antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis serio da lagoj!

Ni venis al la kultiveja oficejo por kolekti kortuŝajn rakontojn pri la tiamaj pioniroj. Estas bedaŭrinde, ke ili preskaŭ ĉiuj estis transpostenigitaj aliloken. Respondeculo de la oficejo diris: "Ĉiujare ni faras edukadon pri la tradicioj, tial ankaŭ la post-venintoj konas ankaŭ la historion de la kultivejo."

Li rekomendis al ni kamaradon Ĝang, kiu estas indiĝeno kun aĝo de pli ol kvardek jaroj, kaj laboris en la kultivejo jam 19 jarojn. Li diris ridetante: "Nemulte mi scias. Se mia rakontado ne sufiĉos, ni povos informiĝi ĉe aliaj." Kaj li komencis sian senĝenan rakontadon.

Post la Liberiĝo, la Partio kaj la registaro mobilizis la popolamasojn por fosi drenkanalojn,

Sablejo antaŭe, fekundaj kampoj hodiaŭ



kiuj forkondukos akvon de multaj malaltaj lokoj. Sole la areo, kie nun sidas la kultivejo, restis ankoraŭ marĉo pro sia tro malalta situacio. En 1954, kiam la unua grupo de agrikulturistoj venis ĉi tien, ili ne povis trovi sekajn terojn por sin instali kaj devis loĝi portempe en domoj de lokaj kamparanoj. Ĉiutage ili komencis laboron frumatene por fari mezuradon en akvo pli ol unu futon profunda kaj revenis malfrue. Post peniga laborego de pli ol unu jaro, oni fosis grandan drenkanalon tra la marĉejo, kaj per ĝi drenis la tutan akumulitan akvon en la Flavan Riveron. Plie oni fosis ankoraŭ tri akvokondukajn trunk-kanalojn kun totala longeco de pli ol tridek kilometroj kaj konstruis pecojn post peco da longbedaj kampoj. En la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, oni transformis pli ol 1,100 hektarojn en kampojn kun pohektara produktokvanto de 4,600 kilogramoj.

Fine maljuna Ĝang kondukis nin al la strato antaŭ la pordo de la kultivejo. Tie viciĝas lernejo, hospitalo, kinejo, butikoj, barbirejo, fotejo, poŝtejo kaj aliaj: ĉe la unu fino de la strato

troviĝas vinpreparejo, olepremejo, farunfabriko kaj sojkazea farejo; kaj ĉe la alia fino linoprilaborejo, riparejo de agrikulturaj maŝinoj, fibro-plata fabriko kaj aliaj. Sin turnante al mi li demandis: “Ĉu vi povas konjekti, ke origine ĉi tie estis la fundo de lago?” Mi ridis: “Tute ne!”

Elirinte el la strato, ni vidis antaŭ ni larĝan kaj profundan kanalon. Maljuna Ĝang diris: “Jen estas la drenkanalo kiu trairas la tutan kultivejon. Nun, oriente kaj okcidente de la kultivejo estas po unu granda trunk-kanalo, kaj en la mezo kuŝas longitudo tiu ĉi granda drenkanalo. La akvo fluas en kampojn de la du alkondukaj kanaloj kaj elfluas kune tra la drenkanalo. Tiamaniere, oni timas nek sekecon nek superakvon, kaj akiras ĉiujare bonan rikolton.

Fruktoproduktejo Lingvu antaŭe kaj nun

Forlasinte la kultivejon Lianhu, ni venis al la gubernia urbo Lingvu laŭ antikva Kin-kanalo. En la historio, tiu gubernio jam estis fama pro

Kingtonghia-akvobaraĵo



siaj konataj miel-persiko, Juhuang-pruno kaj rozvinbero. Nun ĝi estas konata kiel fruktoproduktejo de la irigaciata areo.

Maljuna Vang de la propaganda fako de la partia komitato de la gubernio kondukis nin el la urbo, kaj ni preterpasis fruktoĝardenojn unu post alia, kaj irante centojn da metroj sur montvojeteto ascendis sablan monton. Prezentiĝis antaŭ niaj okuloj mirinda pejzaĝo: Oriente etendiĝas ondantaj dezertaj sabloamasoj, dum okcidente sternaĝas helverda prospera ebenaĵo. “Kia akra kontrasto!” Nereteneble mi kriis.

“Tiujn fruktoĝardenojn kaj kampojn ni ekspluatis dum la pasintaj dudek jaroj.” Maljuna Vang diris al mi. Fingre montrante pagodon apud arbaro, li diris: “Jen Ĝenhe-pagodo, kiun oni starigis esperante subjugi la riveron. Antaŭe,

Riĉa rikolto de pomoj



ekster la okcidenta pordego de la urbo kurbe fluis la Flava Rivero kaj ekster la orienta pordego estis dezertaj sablejoj. Sed nun ĉio ĉi ŝanĝiĝis!” “Kio okazis al la antaŭaj fruktoĝardenoj?” mi intermetis. Maljuna Vang respondis: Antaŭ tre longa tempo ĉi-tieaj fruktoj jam estis fame konataj. Tamen ĝis la antaŭvespero de la Liberiĝo restis nur unu ĝardeno kun areo de 4 hektaroj, kaj unuopaj frukto-arboj dise starantaj. La ĝardeno apartenis al militaristo Ma Hongkuj. Post la Liberiĝo, la popolanoj konstruis grandajn drenkanalojn kaj repelis la Flavan Riveron en ĝian malnovan fluejon fore je dekoj da kilometroj. Nun tiu zono jam transformiĝis en fekundajn kampojn kaj fruktoĝardenojn.

Dum nia babilado, venis renkonte al ni kadro de hortikulturejo, konato de Maljuna Vang. La lasta vokis lin: “Sekciestro Vang! Konduku la gaston por rigardi la ĝardenon!” Kaj li ekgvidis nin al akvedukto longa je pli ol 100 metroj kaj diris: “Unue rigardu niajn triŝtupan kaj duŝtupan akvolevajn pumpstaciojn kaj poste la fruktoĝardenojn sur montdeklivoj kun areo de 174 hektaroj. Nun plejparto de la arboj jam fruktodonas.” Ili ĉiuj estis konstruitaj en la tempo de la kultura revolucio. En la fruktoĝardenoj kreskas pom-, vinber-, persik-, prun- kaj abrikot-arboj. Krome ni rigardis ankaŭ diversajn ekipaĵojn por ŝpruca kaj gutada akvumadoj de la fruktoĝardenoj. Rilate al la kvalito de la lokaj pomoj, sekciestro Vang diris: “Niaj pomoj ĝuas bonan akcepton pro sia dolĉeco kaj bona gusto. Ĉar ili kreskas sub favoraj kondiĉoj: Sufiĉe longa jara sunbrilado, granda temperatura diferenco inter la tago kaj nokto, facila irigaciado kaj sableca grundo.”

En la oficejo de la hortikulturejo sekciestro Vang venigis kelkajn fruktoĝardenistojn por pli detale prezenti al ni la staton. Ni informiĝis, ke la hortikulturejo fondiĝis en 1958. Ĝi posedas areon de ĉirkaŭ 270 hektaroj kaj ĉiujare rikoltas pli ol 1,500 tunojn da fruktoj. Kiam la junaj fruktarboj sur montdeklivoj eniros periodon de multfrukteco, la jara produktokvanto de la fruktoj superos 4,000 tunojn.

“Bonvolu gustumi niajn pomojn!” Montrante pomojn sur tablo iu fruktokulturistino diris al

ni: “Kvankam Lingvu estas konata kiel fruktoproduktejo, tamen en la pasinteco ĝi neniam produktis pomojn.” Ŝi rakontis al ni historion de kulturado de pomarboj en Lingvu. En la komenca periodo de konstruado de la hortikulturejo, oni provplantis unuan aron da pomarbitoj. Post vintro, la arbitoj mortis plejparte. Iu opiniis, ke la arbitoj mortis de frosteco, tial oni ĉirkaŭvolvis la arbotrunkojn per dika tavolo de pajlo antaŭ la alveno de la dua vintro. Sed neniu atendis, ke la arbitoj mortis eĉ pli multe en la tria jaro. La hortikulturistoj ne ĉesigis praktikadon kaj esploradon kaj fine sukcesis vivigi pli ol 40,000 pomarbojn. Dank’ al tio ili resumis kompleton da metodoj por tie kulturi pomarbojn. Ili ankaŭ helpis al lokaj popolaj komunumoj en disvolvo de poma produktado. Kaj ŝi daŭrigis: “Nun la ĉefa problemo estas la malutila prujno en printempo. Nun ni klopodas trovi efikan metodon por solvi la problemon kaj kredas ke ni tion atingos en daŭra provado kaj praktikado.”

Revenante al la gubernia urbo, ni vizitis ankaŭ la hortikulturbran brigadon kaj fruktoĝardenan

brigadon de Dongta-komunumo. Maljuna Vang diris: “Dekkelkaj jaroj forpasis, la hortikulturejo jam elkulturis por diversaj komunumoj kaj brigadoj multajn hortikulturajn teknikistojn. Tio ege akcelis la fruktan produktadon de la tuta gubernio. Nun ĝi vere indas la nomon de ‘Fruktoproduktejo’.”

Fininte la viziton al la irigaciata areo ni veturis al Jinĉuan, la ĉefurbo de la Ninghia-a Hujnacieca Aŭtonoma Regiono. Survoje estis videblaj verdaj rizkampoj borderitaj de kontraŭventaj arbozonoj. Ni ekmemoris originon de “Jinĉuan”, kiu signifas en la ĉina lingvo “arĝentan ebenaĵon”. En la pasinteco, ambaŭborde de la Flava Rivero tute kovriĝis per blanka salalkala tero, tial oni nomis ĝian centran urbon “Jinĉuan”. Samtempe, tiu nomo ankaŭ spegulas la belan deziron de la popolo transformi ĝian hejmlokon en oran kaj arĝentan ebenaĵon, kie aromos rizo kaj fruktoj. Tamen tiun deziron oni neniel povis efektiviĝi en la malnova Ĉinio. En la nova Ĉinio realiĝis la multgeneracia deziro de la huj- kaj han-naciecaj popolanoj ambaŭborde de la Flava Rivero.

Novaj esperantaj eldonaĵoj de Ĉinio:

La Opia Milito

La milito intence provokita de Britio en 1840 estas la unua el serio da agresaj militoj lanĉitaj de la kapitalismaj potencoj por turni Ĉinion en ilian duonkolonion kaj kolonion. Tiu ĉi milito kaj neegalaj traktatoj, devigite subskribitaj de King-registaro kun Britio, portis al Ĉinio ekstreme seriozan rezulton. Ekde tiam, Ĉinio paŝon post paŝo fariĝis duonkolonia kaj duonfeŭda socio, dume, la ĉina popolo komencis tagon post tago fortan kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman revolucian batalon.

Tiu ĉi libreto koncize rekomendis la procezon de la Opia Milito kaj la heroaĵojn de la ĉina popolo kontraŭ la fremdaj invadantoj.

118 pĝ. 13 × 18.5 cm.

RMB¥1.10 £0.31 US\$0.75 F.Fr.3.90 DM3.10

Pramejo

La kolora bildlibro estas por infanoj, kun 70 bildoj. Ĝi rakontas, ke en la tempo de la Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio, ruĝgvardiano Ŝujlian brave batalis kontraŭ klasa malamiko, kiam ŝi deĵoris ĉe la pramejo anstataŭ sia avo post la lernado.

72 pĝ. 18 × 26.5 cm.


RMB¥1.10 £0.31 US\$0.75 F.Fr.3.90 DM3.10

Eldoninto: **Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**

Ĝenerala Distribuanto: **Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio**

Mendu ĉe nia peranto vialoke, aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de Guozi Shudian, P. O.

Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Kruta loko trapasata de la fervojo

AL trafiko jam malfermiĝis la 916-kilometra Hiangfan-Ĉongking-a Fervojo, kiu interligas Hiangfan de Hubej-provinco en la centra parto de Ĉinio kaj Ĉongking de Siĉuan-provinco en la okcidento. Ĝia funkcio havas gravan signifon por la modernigo de nia lando.

Tiu fervojo trakuras tri montegojn, plurfoje transpasas tri riveregojn kaj fine transpasas Gialing-riveron por atingi la lastan stacion Ĉongking, kie ĝi ligiĝas kun la Ĉengdu-Ĉongking-a kaj Ĉongking-Gujjang-a Fervojoj kaj Jangzi-rivero. Tiu linio havas 405 tunelojn, inter kiuj sin trovas 12 kun longeco de pli ol 3,000 metroj kaj 2 kun longeco de pli ol 5,000 metroj, kaj 716 pontojn, el kiuj la plej alta havas altecon de 76 metroj kaj la plej longa havas longecon de 1,600 metroj. La totala longeco de la pontoj kaj tuneloj konsistigas 45% de tiu de la

La Hiangfan-Ĉongking-a Fervojo malfermita

tuta linio. En multaj partoj la trako estas konstruita sur rokmuvo kun torento malsupre kaj 35 stacioj estas konstruitaj sur ponto aŭ en tunelo.

La trapasata tereno de la fervojo estas konata de antikveco kiel loko kun altaj rokmuvo kaj profundaj ravinoj, kie vojetoj multege zigzagas. Sed la heroaj vojkonstruantoj kontraŭbatalis kaj venkis la neimageblajn malfacilojn disvolvante sentiman revolucionan spiriton. Alveninte al la konstruejoj, ili tuj konstruis ŝoseon, tra kiu longaj vicoj da kamionoj daŭre portis instrumentojn, materialojn kaj grenon al diversaj punktoj por trabori montojn kaj meti trakon.

La Tunelo de Daba-montaro, konata kiel "Subtera Koridoro" estas ŝlosila konstruaĵo de tiu linio. La geologia strukturo de tiu loko estas komplika kaj tre varias la tieaj roktavoloj. La konstruantoj devis venki malmolegajn rokojn kaj tertavolon kun elasteco de "kaŭĉuko" kaj potencajn fluojn de subtera akvo kaj sablo. En Bajjun-monto, oni sukcesis trabori tunelon kun longeco de 4,000 metroj en sep monatoj, dank' al foso de oblikvaj ŝaktoj kaj transversaj tuneloj por fosi samtempe ĉe pluraj punktoj. En Malju-monto, oni fosis grandan kavernon kaj konstruis en ĝi fervojan stacion ĉe kiu eblas halti samtempe kvar trajnoj.

Por konstrui tiun fervojon, oni devis konstrui centojn da pontoj trans ravinoj plenumante malfacilegajn laborojn. La Pontego de Zijang super Hangiang-rivero kun pilieroj altaj 76 metrojn estas la plej alta ponto sur tiu linio. Oni konstruis ĉirkaŭmurojn en la torento kaj faris ferbetonajn pilierojn sur kunmetita ŝtala turo kun alteco egala al pli ol 20-etaĝa domo. Dum almeto de ŝtaltrabaĵo, subite ekblovis ventego. Spertaj laboristoj lerte fiksis la ŝtaltrabajon per kvar kabloj kaj sukcese ĝin fiksis ĝis


ngking-a Fervojo al trafiko

oni fine ĝin muntis sur la pilieroj super la torentanta rivero. Dank' al komuna klopodado de la laboristoj, tiu ponto estis sukcese finkonstruita je 23 tagoj antaŭ la planita dato.


En oktobro, 1973, kiam la konstruantoj streĉe plenumis la lastajn kompletigajn laborojn, la meza parto de la linio subite estis atakata de eksterordinara pluvego kaj monttorentego kaj aperis fenomenoj de rokfalo, terglito kaj oblikviĝo de stacidomo. Post observado per instrumentoj, oni trovis, ke la monto estas moviĝanta je rapideco nerimarkebla por okuloj. Tio signifis reaktiviĝon de antikva terglito — de kvanta ŝanĝiĝo al kvalita ŝanĝiĝo. Por preventi ruiniĝon de la fervoja linio, oni elpensis projekton por fiksi la monton per fostegoj, nome fosi serion da ŝaktoj kun profundeco egala al alteco de pli-ol-deketaĝa domo en la glitantaj montodeklivoj, meti en ilin trajojn

el kunvelditaj ŝtalaj reloj kaj stangoj kaj poste enverŝi milon da tunoj da betono por formi fostegojn uzotajn por kateni la glitadon. Ĉe la 20 glitaj punktoj oni faris 288 tiajn fostegojn kun totala longeco de 15 kilometroj.

Hodiaŭ, kiam oni vidas la vicojn da palaj fostopintoj sur montodeklivoj dum veturado sur la Hiangfan-Ĉongking-a Fervojo, oni nature sentas elkoran admiron al la heroaj armeanoj kaj popolanoj, kiuj konstruis tiun vojon.



Ponto ligiĝanta kun tunelo sur la Hiangfan-Ĉongking-a Fervojo



La fervoja pontego super Gialing-rivero

Goldbach-konjekto

(Raportajo)

I

EN la jaro 1933, kiam Ĉen Gingjun naskiĝis en tiu ĉi reala mondo, lia familio kaj la socia vivo ne montris al li belan koloron de rozo. Kiel poŝt oficisto, lia patro estis ĉiam sur vojo. Lia patrino estis bonkora virino tro laciĝita de laboroj. Ŝi naskis 12 infanojn el kiuj nur 6 restis vivaj, kaj nia Ĉen Gingjun estas la tria. Infanoj kun multaj gefratoj ne povis trovi dorlotecon ĉe siaj gepatroj, kaj ili fariĝis ĉiam pli balasto por la lastaj. Kaj de la unua tago kiam li naskiĝis, li venis al la homa mondo kiel proklamita nebonvena persono.

Li eĉ ne ĝuis la ĝojon de infaneco. Ĉar la patrino laboregis tuttage, kaj ne havis tempon por zorgi lin. Kaj kiam li fariĝis memorpova, eksplodis kruela milito. La japanaj imperiistoj invadis lian hejmlokon Fugian-provincon, kaj ankoraŭ tre malgranda li jam vivis en timo. La patro iris al la urbo Sanming por labori kiel estro de branĉa poŝtofacejo. La malgranda oficejo sin trovis en antikva templo en montregiono, kie estis iam revolucia bazloko. Sed tiam la densa arbaro jam fariĝis mizera loko, kie ĉiuj viroj estis murditaj de la kuomintangaj banditoj kaj mankis eĉ maljunuloj. La restintaj virinoj vivis treege mizere. Kiam la japanaj invadantoj okupis Fuĝoŭ, multaj fuĝis en la montaron. Al tiu loko ne venis la malamikaj aviadiloj por bombado kaj iom post iom ĝi prosperiĝis. Sed poste translokiĝis tien koncentrejo. En profunda nokto ofte eĉadis dolore ĝemoj sub skurĝado kaj de tempo al tempo aŭdiĝis pafoj al martiroj. Kaj en la sekvinta tago la katenitoj eliris labori kun pli griza mieno.

Multege vundita estis la infaneca koro de Ĉen Gingjun. Li estis ofte kaptita de konsterno kaj


konfuzo. Li trovis nenion ĝojan en sia hejmo, dum nur ofendojn en la elementa lernejo. Li kutimiĝis al ricevo de batoj kaj sed neniam petis indulgon, kaj tio portis al li ankoraŭ pli multajn batojn, kio tamen faris lin ankoraŭ pli firma kaj eltenema. Tre sentema li tro frue rimarkis la fenomenon de homomanĝado fare de homo en la malnova socio. Li fariĝis homo introspekta kaj amis ekskluzive nur matematikon. La solvado de matematikaj problemoj okupis plejparton de lia tempo.

Kiam li lernis en la unuagrada mezlernejo, al lia loko translokiĝis la Giangsu-a Instituto de malproksima regiono okupata de la malamikoj. Ankaŭ ĝiaj erudiciaj profesoroj kaj lekciantoj donis lecionojn en lia lernejo. Inter ili du alilokaj matematikaj instruistoj tre plaĉis al li, kaj ili ankaŭ ŝatis lin. La malestimo kaj batoj de iuj al li nur pliiĝis lian amon al matematiko. La sekaj algebrakvacioj donis al li grandan feliĉon kaj fariĝis por li unika ĝojo. Post venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, ili revenis al Fuĝoŭ. Kaj Ĉen Gingjun eniris en la gimnazion de Jinghuaŝujan. Tie estis matematika instruisto, kiu estis antaŭe dekano de la Aeronautika Fakultato de la Ŝtata Kinghua-universitato.

II

La instruisto estis erudicia kaj ne sciis laciĝon en sia instruado. En matematikaj lecionoj li donis al la lernantoj multajn interesajn matematikajn sciojn. Eĉ tiuj lernantoj, kiujn ne interesis matematiko, estis allogitaj, por ne paroli pri tiuj, kiuj havis intereson por tio.

Matematiko sin dividas en du partojn: Teoria matematiko kaj aplikata matematiko. Teoria matematiko traktas la rilatojn inter nombroj kaj



Cen Gingjun

ilia spaca formo. La grava branĉo pri la kvalito de entjero en la parto traktanta rilatojn inter nombroj estas nomata teorio pri nombroj. La kreinto de la teorio en la Okcidento estas granda franca matematikisto Pierre de Fermat en la 17-a jarcento. Sed la antikva Ĉinio jam frue faris neordinaran kontribuon al la teorio. *Ĝou Bi* estas la plej antikva klasika matematika verko de Ĉinio. Pli poste aperis ankaŭ alia verko *Sun Zi Suan Ging*, en kiu troviĝas unu rezidua teoremo, kiu estas kreita de Ĉinio. Oni diras ke en la frua periodo de Han-dinastio antaŭ 2,000 jaroj granda militisto Han Hin uzis ĝin en la kalkulado de la nombro de siaj soldatoj. Kaj poste ĝi estis konigita al la Okcidento kaj nomata Teoremo de Sun Zi kiel unu el la famaj teoremoj en la teorio pri nombroj, kaj ĝis Ming-dinastio Ĉinio faris relative grandajn kontribuojn al la homaro en tiu flanko. En la dua duono de la 13-a jarcento la ĉina antikva matematiko atingis sian altan tajdon. Granda matematikisto de Suda Song-dinastio Kin Ĝiuŝaŭ skribis matematikan verkon *Su Su Ĝiu Ĝang*. Lia solvo de simultana lineara ekvacio estis trovita je pli ol 500 jaroj pli frue ol tiu de la granda matematikisto Sainte Euler. La solvo de plurelementa ekvacio de alta grado farita de la granda mate-

matikisto de Juan-dinastio Ĝu Ŝigie estis trovita je pli ol 400 jaroj pli frue ol tiu de la granda franca matematikisto Etienne Bezout. En la dinastioj Ming kaj King kaj pli poste ni postrestis. Tamen Ĉinio servis kiel bona varmbedo por matematiko.

Foje, la instruisto rakontis unu faman malfacilan problemon en la teorio pri nombroj. Li diris, ke kiam la Petro la Unua de Rusio volis konstrui la urbon Peterburgon, li invitis grandan nombron da eŭropaj grandaj sciencistoj, inter kiuj estis la granda matematikisto Euler kaj mezlerneja instruisto el Germanio nomata Goldbach, ankaŭ matematikisto.

En la jaro 1742, Goldbach rimarkis, ke ĉiu granda para nombro povas esti skribita en sumo de du primoj. Li tion certigis post ekzamenado al multaj paraj nombroj. Sed tio bezonis esti pruvota, kaj antaŭ ol tio esti pruvita, ĝi estas nur konjekto. Ĉar li mem ne sukcesis tion plenumi, li do petis per letero helpon de la fame konata granda matematikisto Euler. Sed ĝis sia morto ankaŭ la lasta ne povis plenumi la pruvadon. Kaj tiu fariĝis unu el la malfacilaj problemoj altiranta atenton de miloj kaj miloj da matematikistoj. De pli ol 200 jaroj, neniu

scias kiom da matematikistoj kaprompiĝis vane en la pruvado de tiu problemo.

Je tio, ekbolis la klasĉambro. Tiuj ĵus floran-taj junaj lernantoj varme ekkomentadis pri la afero.

La instruisto diris plie, ke la reĝino de la natura scienco estas matematiko, la krono de matematiko estas la teorio pri nombroj kaj la perlo sur la krono estas Goldbach-konjekto.

Ĉiuj lernantoj rondigis siajn okulojn mirigite.

La instruisto diris: “Vi ĉiuj scias la paran kaj neparan nombrojn kaj ankaŭ priman kaj komponitan nombrojn. Ĉar oni lernas ilin jam en sia tria lernojaro en la elementa lernejo. Ĉu tio ne estas tre simpla? Tamen, la problemo estas plej malfacila, jes malfacilega. Se iu ĝin solvos, li estas homo neordinara, jes tute eksterordinara!”

La junuloj reeksplodis. En kio tio estas malordinara. Ni faru kaj solvu ĝin. Ili tiel fanfaronis.

Ankaŭ ridis la instruisto. Li diris: “Jes, hieraŭ nokte mi eĉ songis ke el vi iu vere eksterordinara pruvis la Goldbach-konjekton.”

Ekridegis la lernantoj.

Sed nur Ĉen Gingjun ne ridis. Ankaŭ li estis skuita de la parolo de la instruisto, sed li ne povis ridi. Se li ridus, oni ĵetus al li oblikvanrigardon. De kiam li lernis en altgrada mezlernejo, li fariĝis pli kaj pli izola. La kunlernantoj ne volis rilatiĝi kun li pro lia strangeco kaj malsaneco, tiel ke li fariĝis pli izolita kaj povis paroli nur kun sia propra ombro.

En la lernohoro de la sekvinta tago, kelkaj relative diligentaj lernantoj gaje prezentis al la instruisto sian laboraĵon, dirante, ke ili jam solvis la problemon kaj pruvis la konjekton de la germano, kaj eĉ de multaj flankoj. Tio estas tute nenio. Ha, ha, . . .

“Lasu viajn sensencaĵojn!” “Viajn laboraĵojn mi eĉ ne rigardos. Ĉu tiel facila estas la afero? Vi fakte volas veturi al la luno per biciklo.”

La klasĉambro ektondris denove de ridego. Nefarintoj pirididis la farintojn, kaj ekridis ankaŭ

la lastaj. Sed nur Ĉen Gingjun ne ridis kun sulkitaj brovoj. Jes, li estis ekster ĉio ĝoja.

III

Liberiĝis Fuĝou! En 1950, Ĉen Gingjun trapasis eniran ekzamenon de Hiamen-universitato kaj studentigis. Pro la aparte eminentaj atingoj en studado kaj urĝa bezono de la ŝtato, li diplomigis antaŭdate. En aŭtuno de 1953, li estis sendita al iu mezlernejo en Pekino por esti matematika instruisto. Kiel feliĉa li tiam devus esti!

Tamen estis tute male! En Hiamen-universitato, li bone pasigis la tagojn, ĉar estis nur kvar studentoj tiam en la sama klaso, dum profesoroj estis kvar kaj ankoraŭ plus unu asistanto. Tre alta estis la efiko de lia studado. Dum la periodo de tri jaroj li tute trempis sin en la maron de matematiko. Estis tute neatendite ke li tiel frue diplomigis. Pensante ke li staros sur podio kiel instruisto sub la rigardo de kelkdek akraj, viglaj kaj iafoje malice petolaj okulparoj, li ekstremis.

Lia imago estis tuj pruvita. Li tute ne taŭgis por esti instruisto. Ĉar li ne lertis en parolado kaj ekdoloris al li la gorĝo post iom longa parolado. Kiom li enviis tiujn lertajn instruistojn. Post la lecionoj li ofte nomis sin stultulo en sia dormĉambro. Li riproĉis sin pli severe ol aliaj. Li neniam povis bone zorgi sin mem nek atentis pri sia nutraĵo, tiel ke li suferis de ftizo kaj akuta abdomena malsano.

En tiu jaro, li sesfoje enhospitaliĝis kaj ricevis tri operaciojn. Kompreneble li ne povis bone plenumi sian taskon, sed li ne forlasis sian studadon pri matematiko. Tiam la Ĉina Akademio de Sciencoj eldonis antaŭnelonge la faman verkon de matematikisto Hua Luogeng *Aditiva Teorio de Primoj*. Tuj ĉe ĝia surbretiĝo en librejo, Ĉen Gingjun jam aĉetis ĝin kaj eniĝis en ĝin. La verko estas tiel profunda, kiel ĝi estas malfacila! Sed li mordetis ĝin.

Foje rektoro de Hiamen-universitato venis al Pekino por ĉeesti kunvenon okazigitan de la Eduka Ministerio. Iu gvidanto de la mezlernejo renkontis lin. En la babilado, la antaŭa plendis malkontente kaj miris ke la universitato kulturis tian “talentan” lernanton.

Pri tio multe surpriziĝis la rektoro de Hiamen-universitato Vang Janan. Li konsentis ke Ĉen Gingjun revenu al la universitato.

Informiĝinte ke li povas reveni al la matematika fakultato de Hiamen-universitato, tre strange la farto de Ĉen Gingjun tuj pliboniĝis. La rektoro postenigis lin al la biblioteko de la universitato, tamen lasis lin okupi sin pri studado de matematiko, sed tute ne pri administrado de la libroj. Vang Janan estas tute inda kritikisto de politika ekonomio, ĉar li bone konas teorion de valoro kaj la valoron de la homo. Ankaŭ Ĉen Gingjun ne vanigis la kulturadon fare de la maljuna rektoro. Li tre profunde kaj diligente studis la verkojn de Hua Luogeng la *Aditiva Teorio de Primoj* kaj la *Enkonduko de Teorio pri Nombroj* en tre dika volumo.

Ĉen Gingjun verkis baldaŭ disertajon koncerne al teorio pri nombroj kaj sendis ĝin al la Mate-

matika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Hua Luogeng, estro de la instituto, tuj rimarkis en la verko la brilan inĝeniecon de la verkinto kaj proponis akcepti tiun en la Matematikan Instituton kiel esploranto-praktikanto.

Je la fino de 1956, Ĉen Gingjun refoje venis de la suda marbordo al la ĉefurbo.

Tiam en la matematika rondo de Pekino koncentriĝis multaj eminentaj specialistoj junaj kaj maljunaj. En la fakoj de analiza teorio de nombroj, algebra teorio de nombroj, teorio de funkcioj, funkcionala analizo, geometria topologio k.a. jam amasiĝis talentoj. Kaj nun aperis Ĉen Gingjun. Jen la kondiĉoj estis pretaj, kaj Hua Luogeng faris dispoziciojn: Koncentri la fortojn ĉefe en aplikata matematiko sed ankaŭ marŝi al Goldbach-konjekto, la perlo sur la krono!

(daŭrigota)

Pro la sano de la popolo


LA SANPROTEKTA RETO DE DAKING-OLEKAMPO

En Daking-olekampo troviĝas 500,000 laboristoj kaj oficistoj kaj iliaj familianoj. La sanprotektata reto el hospitaloj, profilaktikaj stacioj, kuracdomoj kaj higienaj stacioj, provizas la laboristojn, oficistojn kaj iliajn familianojn per oportuneco kaj kondiĉoj por preventi kaj kuraci malsanojn.

La laboristoj, teknikistoj kaj oficistoj de la olekampo ĉiuj ĝuas senpagan kuracadon. Iliaj familianoj kaj infanoj ricevas senpage profilaktikajn medicinaĵojn kaj inokuladon. La aliajn kostojn ili pagas nur duone. Tio estas en akra kontrasto al la stato de laboristoj en la malnova socio, en kiu laboristoj kaj iliaj familianoj mortis ofte pro manko de mono por kuraci gravajn malsanojn.

Troviĝas en la centro de la olekampo ĝenerala hospitalo kun modernaj ekipaĵoj, kaj ankaŭ tri fakaj hospitaloj kaj unu profilaktika stacio. En ĉiu el la kvin distriktoj de la olekampo estas unu ĝenerala hospitalo kaj ĉiu produkta komandejo havas sian centran kuracdomon kun 20 ĝis 50 litoj. Kaj en la vilaĝoj, kie loĝas la familioj de laboristoj kaj oficistoj, troviĝas 118 kuracdomoj. La plej malgrandaj sanprotektaj unuoj en Daking-olekampo estas higienaj stacioj, kiuj nombras sin 1379. Tiuj stacioj provizitaj per ofte uzataj medikamentoj dislokiĝas en putoboraj taĉmentoj, petrolkolektaj taĉmentoj, laborejoj, agrikulturaj produktaj grupoj kaj lernejoj, por ke la laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj povu facile ricevi tujan kurachelpon ĉe okazo de negravaj malsanoj aŭ vundiĝoj.

Pli ol triono de la kuracistoj de la hospitaloj kaj kuracdomoj ofte iras al la bazaj produktaj unuoj



Hospitalo de Daking-olekampo



Kuracistoj faras rondiran kuracadon sur laborejo.

por fari rondiran kuracadon. Kunportante X-radian aparaton, mikroskopon kaj laboratoriajn instrumentojn, ili faras por laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj ĝeneralan sanekzamenon aŭ kuracadon kaj ankaŭ starigas por ili dosieron pri la sanstato. Ili kuracis pacientojn suferantajn negravajn malsanojn ĉe iliaj hejmoj kaj sendis la gravajn malsanulojn al hospitaloj ĝustatempe.

Hospitaloj en kunlaboro kun laborprotektata fako alprenas paŝojn por preventi profesiajn malsanojn. Ili projektis laborprotektan superveston por laboristoj, kaj ankaŭ konstruis moviĝantan manĝvagonon, por ke ili ricevu varmajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Dank' al tio al laboristoj kaj oficistoj estas preventitaj la profesiaj malsanoj, stomaka malsano kaj artrito.

Pli ol 80,000 neprofesiaj sanprotektistoj venas el laboristoj, dommastrinoj kaj lernejoj. Krom kuracado de negravaj malsanoj kaj vundoj, ili disvastigas higienajn sciojn kaj aparte preventajn rimedojn kontraŭ infektaj malsanoj sezonaj. Ili ankaŭ helpas en inokulado kaj plibonigo de higienaj kondiĉoj de la medio kaj de higieno en manĝado kaj trinko.

RAPIDA MULTIĜO DE TIBETA POPULACIO

La Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio nun havas 1,630,000 loĝantojn. De sia paca liberiĝo de 1951 ĝis la fino de 1977, la populacio de tibeta popolo ĉiujare kreskis meznombre pli ol 2 procentojn kaj pliiĝis je 440,000 personoj kompare al tiu de 1959 antaŭ la demokratia reformo.

Ekzemple, Baj Ĝang, komunumanino de Bazi-gubernio, naskis 5 infanojn dum 10 jaroj post sia edziniĝo, kaj ĉiu vivas sane. Sed ŝia patrino en la malnova socio naskis sep infanojn, el kiuj du mortis pro aborto kaj kvar pro morbito.

Sub la regado de la servuta sistemo, dekmiloj da sklavo kaj servutuloj estis mortigitaj aŭ jetitaj en karceroj aŭ devis forfuĝi aliloken. Sub la premado de pezaj kaj varispecaj impostoj, servdevoj, terrento kaj uzuro, la servutuloj tute ne povis ricevi kurachelpojn. Kiam ekaperis

variolo, ĥolero aŭ aliaj epidemioj, la nobeloj, superaj lamaoj kaj lokaj registoj simple pelis la malsanulojn en profundan montvalon de soldatoj garditan por ke tiuj tie mortu de malsato aŭ de bruligo. Pli ol 7,000 personoj mortis sole en la regiono de Lasao en 1925, kiam variolo aperis tie.

Dum la demokratia reformado renversiĝis la feŭda servuta sistemo, kiu regis de miloj da jaroj en Tibeto. Dank' al tio miliono da servutuloj ekonomie kaj politike liberiĝis el la premado kaj ekspluatado. Kun disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo de la loko, ilia vivnivelo multe leviĝis. Tio estas la ĉefa kaŭzo de rapida kresko de la populacio en Tibeto.

Jam en la jaro 1951, kiam la Popola Liberiga Armeo eniris en Tibeton, la kuracaj taĉmentoj alvenis por preventi kaj kuraci malsanojn por la popolo. Ekde tiam la centra registaro sendis grandajn nombrojn da kuracistoj al Tibeto kaj kulturis grandajn nombrojn da tibetaj kuracistoj. En la pasintaj jaroj pli ol 2,000 kuracaj laborantoj el Ŝanhajo kaj provincoj Liaŭning, Henan,

Tibetaj geknaboj en lernado



Ŝandong, Giangsu, Hunan, Hubej kaj Siĉuan, periode iris al Tibeto por fari rondiran kuracadon kaj kulturaj nudpiedajn kuracistojn por tieaj fabrikoj, vilaĝoj kaj paŝtregionoj.

Ĉiu gubernio de Tibeto nun havas unu hospitalon starigitan de la ŝtato, kaj ĉiu komunumo havas sian kuracan stacion. Pli ol 11,000 nudpiedaj kuracistoj laboras en diversaj lokoj de Tibeto. Kiam aperas epidemioj, la kuracaj laborantoj rapidas al tiuj lokoj por doni sian helpon. La ŝtato difinis ke ĉiuj hospitaloj en Tibeto kuracas senpage la tibetajn malsanulojn. Pro tio la nombro de mortintoj multe reduktiĝis.

La ĝenerala disvastigo de akuŝigado laŭ moderna procedo multe kontribuas por altigi la vivantecon de naskitaj beboj. Dum pli ol 20 jaroj depost sia fondiĝo, la Popola Hospitalo de la Aŭtonoma Regiono en Lasao, meznombro helpis 1,100 akuŝojn ĉiujare, la vivanteco de naskitaj beboj superis 98 procentojn. En la pasinteco la tibetaj virinoj devis akuŝi en stalo, ĉar la servutul-mastro disvastigis la superstiĉon, ke akuŝo estas malpura afero farebla nur en stalo. Sekve, multaj patrinoj mortis de puerpera febro kaj multaj beboj de tetano.

Hodiaŭ, inokulado kontraŭ BCG, variolo, kokluŝo kaj infana paralizo estas farata senpage al infanoj.

Ĉinio estas lando kun grandnombra loĝantaro kaj nun estas efektivigata laŭplana nasko tra la tuta lando por limigi la kreskadon de la loĝantaro. Sed en nacimalplimultaj regionoj tio ne estas farata inter ĝiaj loĝantoj, escepte se la geedzoj mem tion deziras, nur en tiu okazo la registaro donas al ili la saman helpon.

ELIMINO DE MALARIO EN MALARIA REGIONO

Kajli-gubernio sur Junnan-Gujĝoŭ-Altebenajo en la sudokcidento de Ĉinio fundamente malaperigis malarion.

En la pasinteco, la tieaj klimato, pluvkvanto k.a. naturaj kondiĉoj favoras al vivado de moski-


toj, kaj la reakciaj regantoj en la pasinteco neniam zorgis pri la vivo kaj sano de la popolo, tial la gubernio fariĝis famkonata malarieca regiono. 60-70% el la miaŭ-a kaj han-a popoloj loĝantaj en tiu loko suferis malarion. Post la Liberiĝo, la ŝtato aktive disvolvis amasan laboron por elimini malarion. Dank' al tio suferantoj de malarieco reduktiĝis al 0.003%. En la tuta gubernio inter 300,000 loĝantoj, nur 9 suferis malarion, kaj ili ricevis tuj kuracadon.

Ekzameni la sangon de ĉiuj febrantoj estas unu el rimedoj por elimini malarion aplikitaj en Kajli-gubernio. Ĉe ĉiu trovita kazo oni tuj donis kuracadon ĝis plena resaniĝo, por senigi fonton de infekto. Samtempe oni ekstermas per drogoj moskitojn kaj faras ĝeneralan ekzamenadon al la loĝantoj en la vilaĝoj, kie aperas nova malariuloj.

Laŭ enketado fare de lokaj profilaktikaj laborantoj la ĉefaj perantoj kaŭzantaj malarion estas moskitoj en tiu loko. Tiuj moskitoj kvankam vivas vaste, tamen ĝia infektpovo estas malalta. Sekve, se oni ĝustatempe resanigas la suferantojn de malarieco, oni povas interrompi la infektan vojon.

En Kajli-gubernio troviĝas sume 99 vilaĝoj. Kiam la malariuloj reduktiĝis al malpli ol 0.05%, tiuj malsanuloj multe malkoncentriĝis, la preventajn laborojn ĉefe plenumis la baza higiena reto en la kamparo.

En la jaro 1965, ĉiuj produktaj brigadoj de Kajli-gubernio havis siajn higienistojn, kiuj ne apartiĝis de produkta laboro. En la Granda Proleta Kultura Revolucio oni starigis kooperan kuracajn sistemojn kaj kulturis nudpiedajn kuracistojn. Nun ĉiu popolkomunumo havas hospitalon, kaj ĉiu brigado sian kooperan kuracajn stacion. Tiuj formas bazan sanprotektan reton. La plejparto de nudpiedaj kuracistoj kaj higienistoj scipovas diagnozi malarion, enketi malsanan historion de malariuloj kaj organizi amasajn kuracajn laborojn por elimini malarion. 70 el 100 malariuloj en la tuta gubernio estas diagnozitaj kaj kuracitaj de tiuj bazaj higienaj laborantoj.



Luan Gjugie

Skermistino

Luan Gjugie

de JAN NAJHUA

LA ĉina skermistino Luan Gjugie gajnis la duan lokon en la virina rapirado de la 29-a Monda Junula Skerma Pokalkonkurso, okazinta en Madrido de Hispanujo, marte de la kuranta jaro. Pro tio multaj fremdlandaj amikoj varme gratulis la ĉinan teamon, kaj apartan ĝojon sentis la aziaj amikoj. Ĉar ĉiuj unuaj ses lokoj de ĉiu rapirado komence de la jaro 1901 estis okupitaj de eŭropaj skermistinoj, tamen nun azia skermistino unuafoje akiris la duan lokon. Kia ĝojo estas por ili!

ANTAŬEN DE LA 17-A ĜIS LA 2-A LOKO

La plejparto de la pli ol 200 geskermistoj partoprenintaj en la konkurso estis veteranoj inkluzive de tiuj kiuj gajnis la unuajn ses lokojn de la antaŭa konkurso. Kaj inter la rapiristinoj multaj estis riĉaj je sperto kaj eminentaj en tekniko, dum nia Luan Gjugie gajnis nur la 17-an lokon en la antaŭa konkurso, eĉ ne enirinte la duonfinalon. Sed nun, ŝi volis batali kontraŭ tiuj spertuloj, elmontrante sian bonan stilon kaj nivelon, kaj bonajn sukcesojn atingi por glori sian socialisman patrolandon.


Ekde la unuaj matĉoj, malgranda Luan jam plenumis sian promeson. Aŭdace skermante, ŝi gajnis la unuajn lokojn en la unuaj tri rondoj. En la duonfinalo, ŝi venkis per decidemaj atakoj unue la sovetian skermistinon Dmitrenko, kiu gajnis la duan lokon en la pasinta konkurso, per 1 : 8, kaj poste la faman italan rapiristinon Cicconetti per 4 : 8. En la unua matĉo de la finalo, malgranda Luan renkontis la fortan sovetian skermistinon Jagareva, kiu venkis Luan per 4 : 5 en la kvalifika matĉo. Nun ili refoje renkontiĝis kaj la batalo estis ekstreme intensa. En la unua asalto Luan gajnis per unu abrupta atako, dum la dua asalto, kiam la du sportistinoj arde interbatalis, subite rompiĝis la rapiro de Jagareva, tamen ŝi ne tuj ĉesis atakadi kaj la rompita rapiro trapikis la skerman veston de la kontraŭulo kaj enpikis en ŝian maldekstran brakon tenantan la rapiron. Grave vundiĝis malgranda Luan kaj la juĝisto tuj serioze avertis Jagareva. Tiam el eksento de sensobtuzeco kaj doloro de sia brako Luan ekkonsciis pri sia vundiĝo, tamen spite de tio ŝi ankoraŭ daŭrigis

la batalon kunpremite la dentojn. Malgraŭ la vundiĝo kaj postiĝinteco de 2 : 1, ŝi sinsekve piktrafis kvarfoje la kontraŭulon kaj fine gajnis tiun ŝlosilan matĉon per 4 : 5.

Sed la vojo al venko ne estis ebena, ŝin atendis ankoraŭ malfaciloj. Kiam en la dua matĉo kontraŭ la franca skermistino Latrille, kaj en la tria matĉo kontraŭ la itala skermistino Zaccaroni, malgranda Luan estis aljuĝita respektive per unu puna trafo kaŭze de la demando pri instrumento. Vundo, laco kaj intensa batalo estis nenio, tamen tiu neatendita malagrablaĵo tiel forte subpremis malgrandan Luan, ke ŝi malvenkis respektive per 5 : 3 kaj 5 : 2. La malfaciloj kaj malfavoraĵoj ekzamenis Luan Gjugie. Ŝi tamen tuj retiris sian malbonan humoron kaj sin ĵetis en la batalon, kiam ŝi ekpensis pri la honoro de la patrolando. Kun kuraĝa, rezoluta kaj obstina spirito ŝi venkis la okcidentgermanan kaj francan skermistinojn respektive per 4 : 5 kaj 3 : 5 en la kvara kaj kvina matĉoj kaj gajnis la duan lokon en tiu ĉi skerma konkurso. La senĉesa manklakado esprimis la gratulon kaj admiron de amikoj kiuj estis tuŝitaj ne nur de la eminenta rapirarto de malgranda Luan sed pli grave de ŝiaj senŝanceliĝemo, firma volo kaj obstina batalspirito montritaj antaŭ la malfaciloj.

LERTECO VENAS DE EKZERCADO

La malpli-ol-20-jara Luan Gjugie naskiĝis en laborista familio loĝanta en Nankino, Giangsu-provinco, kaj ŝatis sporton jam de sia infaneco. En 1973 ŝi partoprenis en la trejnado de atletiko kaj volano de la Nankina Postlabora Sporta Lernejo. Post nelonge ŝi sin turnis al skermado. Tiu sporto por ordinaraĵoj estas monotona, seninteresa kaj peniga en trejnado. Tamen, malgranda Luan decidis ne ŝpari sian energion por nepre sin lertigi tra ekzercado, kiam ŝi ekamis la nomitan sporton. Sub helpo de la gvidantoj kaj aliaj kamaradoj, ŝi iom post iom starigis al si ideon glori la patrolandon per atingo en sia rapirado. Por sin ekzerci en skermado, ŝi devis ĉiam svingi sian brakon en aero, spite al frosta vintro. La somero de Nankino estas humida kaj varmega, la temperaturo iam povas



En ekzercado

atingi 40°C. Sed malgranda Luan en dika vesto kaj skerm-kasko persistis en ekzercado. Nur pri unu saltpaŝo ŝi devis senĉese fari pli ol 500 fojojn kaj antaŭ ol atingi tiun sumon ŝia vesto estis jam malsekigita de ŝvito, sed ŝi neniam plendis pri tio. Dank' al tio, en 1974 kiam ŝi unuafoje partoprenis en la landa konkurso, ŝi jam gajnis la duan lokon, kaj altiris la atenton de la skerma rondo. En la sekvinta

jaro, ŝi gajnis la kvaran lokon en la Tria Tutlanda Sporta Kunveno, kaj en la pasintjara tutlanda konkurso, venkinte ĉiujn rivalojn ŝi gajnis la ĉampionecon per sia lerta rapirado.

ANTAŬEN SENHALTE

La sukcesoj kaj gloro ne povas haltigi la antaŭenpaŝojn de malgranda Luan. Ŝi ankoraŭ pli severe sin postulis, diligente sin ekzercis kaj modeste lernis de veteranoj. Ekz., de siaj trejnistoj ŝi lernis rapidan sturmon en atako kaj atakon en defendo.

Luan Gjugie lertas ankaŭ en cerbumado, senĉese resumas siajn spertojn de sukceso kaj lecionojn de malvenko, kaj de tio ŝi povas trovi siajn malfortaĵojn kaj multe sin ekzerci por kovri sian malfortan punkton. Sia ekatako en skermado estas malforta. Pro tio dum la matena ekzerco ŝi persiste ekzercas sin krom per longdistanca kaj rapidoŝanĝa kurado, ankaŭ per akcela kuro en mallonga distanco kaj per rapidaj saltpaŝoj. Por pliiĝi la malfacilecon kaj rapidecon en sia ekzercado, ŝi ofte invitis virajn skermistojn ekzerci kun ŝi, tial ŝia tekniko leviĝis pli rapide ol tiu de aliaj.

Post sia atingo en la Madrida Konkurso, Luan Gjugie diris, ke ŝi prenos tion kiel novan startpunkton por plua progresado.


Nova Rubriko

“Fotoj pri natura belaĵo”

De la jaro 1979 ni malfermos en nia gazeto novan rubrikon, en kiu ni aperigos fotojn pri natura belaĵo faritajn de ĉinaj aŭ eksterlandaj esperantistoj. Kun la foto (en grandeco proksimume de 6 koloroj) oni bonvolu aldoni klarigon pri la fotoĵo. Ni ne resendadas neuzitajn fotojn. Al senditoj de ĉiuj uzitaj fotoj ni rekompencos per donacaĵo aŭ memoraĵo.

Ni atendas kunlaboron de fotamantoj tra la tuta mondo.

La Redakcio de EPC





La Okcidenta Lago

La Okcidenta Lago de Hangĝou en Ĝeĝiang-provinco iom post iom ekfamigis de Tang-dinastio (618-907 p. K.) pro siaj pitoreskaj pejzaĝoj. Dum pli ol 1,000 jaroj, la laboranta popolo plibeligis ĝin per siaj saĝeco kaj kreivo. La hodiaŭa Okcidenta Lago ĉarmas la turistojn per siaj belaj pejzaĝoj, diversaj kioskoj kaj pavilonoj kaj historiaj restaĵoj.

Fotoj de JAN GIN

Huanglong-kaverno






Pejzaço de Jukjuan-fonto



Cujti-digo



Zigzaga ponto

Post emeritiĝo

— Notoj pri vivo de emeritaj laboristoj de la Unua
Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko de Nantong

EN nia lando la gemaljunuloj ne estas forĵetitaj kaj forgesitaj aŭ frontantaj al konflikto inter diversaj generacioj, sed feliĉe travivas siajn krepuskajn jarojn sub bona zorgado de la ŝtato.

I

En iu kvietita korto staras nova brika domo kun ses ĉambroj, antaŭ kiu kuŝas malgranda florbeto kun ruĝa peonio, blanka magnolio kaj dekoj da florbetoj, kiuj formas plaĉan vidaĵon. Oni povas ofte vidi, ke kelkaj maljunuloj kun grizaj haroj sur la tempioj sidas apud la florbeto kaj gaje interparolas. Ifoje ili ludis ŝakon ĉirkaŭsidante, legis librojn kaj ĵurnalojn, kaj komentis pri gravaj aferoj de la mondo. Hodiaŭ ili babilas kunsidante kaj de tempo al tempo eksplodas ridoj.

Tiuj maljunuloj estas emeritaj laboristoj de la Unua Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko de Nantong en Giangsu-provinco. La fabriko, en kiu ili laboris, estas granda fabriko kun historio de ĉ. 80 jaroj. Nun pli ol 3,400 inter la pli ol 5,000 laboristoj, kiuj eniris en la fabrikon antaŭ la Liberiĝo, jam emeritiĝis. Laŭ difino de la ŝtato ŝpinteksaj laboristoj povas emeritiĝi atinginte la aĝon de 50 jaroj (por virino) aŭ de 60 jaroj (por viro). La emerito ricevas ĉiumonate pension en sumo de 50% ĝis 70% de sia antaŭa salajro laŭ laboraĝo. Tiuj, kiuj estis kripligitaj pro laborado, ricevas pli altan pension. Iuj el ili jam ricevis pension pli ol 20 jarojn. En iuj familioj de laboristoj troviĝas emeritoj jam de du generacioj. Ili plejparte loĝas en laborista loĝejo.

La 17-a kaj 18-a ĉiumonate estas tagoj, en kiuj la emeritoj revenas al la fabriko por inter-

renkontiĝi kaj ricevi pension. Frumatene, en pura vesto ili venas tri-kvin-ope al la fabriko kunveno. La kasistoj kun rideto enmanigas al la maljunuloj iliajn pensiojn, kaj la gvidantoj de la fabriko aŭ komunikas al ili lastatempajn instrukciojn de la supera instanco, aŭ raportas pri la situacio de la lando kaj de la mondo aŭ pri la produkta stato kaj novaj atingoj de la fabriko. Ifoje la fabriko projekcias filmon aŭ prezentas artan programon por ili.

II

Dank' al varma zorgado de diversaj flankoj, la emeritaj laboristoj de la fabriko ĉiuj havas kvietan vivon. Ni prenu Ĝaj Fu, la plej aĝan laboriston el la fabriko, kiel ekzemplon. Kiam la kapitalistoj fondis la fabrikon, li komencis labori kiel kulio en ĝi. Kvankam li laboregis kiel kulio dum 50 jaroj, tamen sub kruela ekspluatado li estis tiel malriĉa ke li ne povis fondi eĉ familion. Ĝuste kiam li estis en ĉagrenado pro sia maljuneco kaj kadukeco, la urbo Nantong liberiĝis. Nelonge poste Ĝaj Fu fariĝis unu el la unua grupo de emeritaj laboristoj de la fabriko kaj vivis emerite kun sia nevo. Poste li vizitis vesperan lernejon por emeritaj laboristoj, forigante sian analfabetecon kaj akiris eblecon legi librojn kaj ĵurnalojn. Ĉiumatene, li iris al parko por ekzerci sin per tajĝiĉuan-o kaj gimnastiko. Ifoje li ludis ŝakon kun kelkaj maljunaj amikoj aŭ rigardis televidon aŭ filmon. Li ŝatis rakonti historiojn al etuloj de infanĝardeno kaj spektis infanajn prezentojn. La infanoj intime nomis lin "maljuna avo". Ĝaj Fu forlasis nian mondon en la aĝo de 96 jaroj. La fabriko entombigis lin kaj okazigis funebran kunvenon por li.

Cuj San, laboramiko de Ĝaj Fu, antaŭ la Liberiĝo estis elpelita de la kapitalistoj el la fabriko pro tio ke li perdis laborkapablon, kiam lia dekstra mano estis fortranĉita de maŝino. En la malnova socio li kun sia 3-jara filo migris 10 jarojn kiel almozulo. En la komenco de la Liberiĝo, la komitato pri refunkciado de la fabriko revokis lin de alia loko kaj asignis al li konvenan laboron kaj novan loĝejon. Tiel ankaŭ lia filo povis viziti lernejon. Post kiam Cuj San emeritiĝis, la fabriko akceptis lian filon kiel laboriston. Troviĝas ĉ. 100 tiaj senlaboruloj, kia estis Cuj San, kiu perdis laboron pro malsano aŭ kripliĝo antaŭ la Liberiĝo kaj ricevis laboron post la Liberiĝo.

En la nova Ĉinio la emeritaj laboristoj ĝuas ankaŭ senpagan kuracadon same kiel laboristoj kaj oficistoj. Por ke emeritaj laboristoj bone fartu, la fabriko periode sendas siajn kuracistojn por fari kompletan san-ekzamenon al ili kaj kontraktas kun kelkaj hospitaloj por ke ili povu ricevi kuracadon ĉe proksima loko en okazo de malsaniĝo.

Guo Suoĝen estas emerita laboristino. Kvan- kam ŝi jam havas blankajn harojn, tamen ŝi

havas sanan korpon kaj firman paŝon. Vidante ŝin tiel sana kaj fortika, oni ne povas pensi ke ŝi iam suferis de multaj malsanoj. Kiam Guo Suoĝen estis naŭ-jara, ŝi devis labori en fabriko kiel infanlaboristino, kaj pro sufero de diversaj turmentadoj ŝia sano serioze difektiĝis. Post la Liberiĝo la fabriko multfoje sendis ŝin al la Tajhu-a Sanatorio kaj la Hangĝoŭ-a Laborista Sanatorio por ricevi kuracadon en la pejzaĝaj lokoj. Dank' al tio ŝi resaniĝis. En 1970, la fabriko farigis ĝeneralan ekzamenon pri la sanstato de emeritaj laboristoj kaj trovis ke ŝin atakas ezofaga kancero. Tiutempe la partia komitato de la fabriko tuj asignis kuraciston kaj oficiston akompani ŝin al Ŝanhajo por ricevi kuracadon. Sub zorga flegado de kuracistoj kaj flegistoj la grava ĥirurga operacio sukcesis. Dum la operaciado oni transfuzis al ŝi pli ol 5,000 mililitrojn da sango kaj la tutan elspezon por la operacio kaj medikamentoj de 2,000 juanoj pagis la fabriko. Informiĝinte pri tio ke ŝi bezonas raran drogon, gvidantoj de la urbo Nantong tuj helpis por akiri ĝin. Gvidantoj de la fabriko multfoje vizitis kaj konsolis ŝin, kiam ŝi estis en hospitalo.



83-jara majstro Maŭ Ginda (meze) kaj liaj kolegoj

*Emerita laboristino
Huang Jujing kaj ŝia
familio*



En la fabriko gemaljunuloj, kiuj ne havas idojn, ricevas apartan prizorgon. Inter ili iuj loĝas en kolektiva loĝejo de la fabriko sub zorgado de speciale asignitaj laborantoj, aliaj transloĝiĝis en familiojn de laboramikoj kaj vivas en ili kiel novaj membroj. Dank' al tio tiuj gemaljunuloj ĝuas varmecon de familio. Maljunulino Vu Ĝang estas unu el ili.

Vu Ĝang perdis sian edzon en juneco. Post emeritiĝo en 1954, ŝi restis en kolektiva loĝejo. Ĝang Hiaŭmej, kiu laboris en la laborista sindikato, estis taskita speciale prizorgi tiujn emeritajn gelaboristojn kaj ŝi havis por Vu Ĝang grandan simpatian kaj ofte venis babili kun la maljunulino en libertempoj. Dum ĉiu festo, ŝi invitis la maljunulinon por gastigi ŝin en sia familio kaj speciale preparis por la maljunulino manĝaĵojn, kiujn ŝi ŝatas. Poste Ĝang Hiaŭmej kun konsento de siaj edzo, filino kaj bofilo, invitis la maljunulinon kune vivi en ŝia hejmo.

En la komenco, la maljunulino estis iom sinĝena timante ke ŝi eble estos ĝena por la familio. Poste ŝi iom post iom trovis ke ĉiuj membroj inkluzive eĉ la okjaran nevinon montriĝas tre intimaj kun ŝi. La maljunulino

tre ĝojis. Nelonge poste ŝi oficiale registriĝis kiel membro de la familio.

La homoj, kiuj ne scias la tutan aferon, erare opinius ke Vu Ĝang estas propre patrino de Ĝang Hiaŭmej pro tiel intima rilato ke la familio ŝarĝas sin per la kostoj de vesto kaj manĝo de la maljunulino, lasante al la maljunulino libere disponi pri sia pensio. Por ke Ĝang Hiaŭmej plene fordonu sin al sia laborado, la maljunulino same kiel patrino volonte prenas sur sin la taskon de dommastrumo. En la lastaj jaroj, Vu Ĝang fariĝas pli grandaĝa kvankam kun korpo ankoraŭ fortika, tamen Ĝang Hiaŭmej firme malkonsentis al la maljunulino ke ŝi plu zorgu pri hejmaj laboroj. Pensante pri la pasinta vivo, la maljunulino diris ofte: Ja vere bona estas la kadro edukita de la Komunista Partio! Mi estas ĉi tie pli bone traktata ol de parenco.

III

Kvankam la emeritaj gelaboristoj jam forlasis sian fabrikon, tamen ilia koro ĉiam restas sur sia posteno. Ĉiam kiam la fabriko ricevas urĝan taskon, la emeritoj meminciate organizis sin

por doni teknikajn helpojn kaj kuraĝigi la laboramikojn. Iuj eĉ rekte partoprenis en produktado. En la lastaj jaroj la fabriko ĉiam estis inter la unua vico de la ŝpinteksa fronto de la tuta lando, tio estas neapartigebla kun la kontribuo de emeritaj laboristoj.

83-jara majstro Maŭ Ginda estis oka-klasa riparisto en la laborejo de fajna fadeno. En multjara laborado li akumulis riĉan sperton. Trairante la laborejon li povas scii kiu maŝino ne estas en ordo kaj per aŭskultado li povas determini kiu maŝinparto estas en perturbo. Li estis multfoje elektita kiel labormodelo. Inter laboristoj, kiujn li kulturis, iuj fariĝis vicestro de revolucia komitato de la fabriko, aliaj gvidantoj de laborejoj kaj la triaj teknikistoj. En 1967, disvastiĝis la informo ke majstro Maŭ emeritiĝos, pluraj fabrikoj funkciigataj de komunumoj tuj petis lin labori en iliaj fabrikoj kiel teknika konsilanto. Pro tio, ke li jam pene laboris dum la vivo kaj nun liaj ekonomiaj kondiĉoj estas sufiĉe bonaj (la menciita korto en la komenco de la artikolo estas ja ĝuste lia domo), li kaj lia edzino bone meritas ĝui feliĉan vivon emeritan. Sed vidante la fervoran labo-

remon disvolvitan en diversaj frontoj, li ne povis resti senfare, tiel ke li konsentis labori en iu fabriko proksima al lia hejmo kiel teknika konsilanto. Ifoje li ankaŭ iris al la priservita kaj aliaj fabrikoj por doni helpon solvi malfacilajn problemojn renkontitajn en teknika renovigo. Li estas estimata veterano de la ŝpinteksa fronto.

Fakte estas multaj tiaj maljunaj laboristoj kia estas majstro Maŭ. La fabriko havas pli ol 3,000 emeritajn laboristojn, el kiuj pli ol duono okupiĝas pri diversaj sociaj aktivadoj. Iuj laboras kiel eksterlerneja gvidanto, aliaj kiel senpagaj administristoj de biblioteko. La estroj kaj vicestroj de la 11 loĝantaraj komitatoj ĉirkaŭ la fabriko ĉiuj estas emeritaj laboristoj. Estro de la Higongfang-a loĝantara komitato, la emerita laboristo Pan Hiaŭmej, aktive laboras por la loĝantoj per fondo de politika vespera lernejo, starigo de klerigaj organizoj, disvolvo de patriota higiena movado, bona prizorgo de eksterlerneja eduko al gejunuloj kaj infanoj. Tial la laboroj de la loĝantara komitato tre eminente disvolviĝis kaj ĝi estas honorita kiel avangarda kolektivo de la tuta urbo kaj ricevis publikan laŭdon.



En tago por ricevi pension

Sur la stratoj de Hefej

HEFEJ estas la ĉefurbo de Anhuĵ-provinco. Lastatempe mi vizitis la urbon kaj ricevis profundan impreson de la nova spirita fizionomio de ĝia popolo.

Varmkoraj biletistinoj de aŭtobusoj

Iun posttagmezon mi atingis la urbon Hefej per trajno. Elirinte el la stacio mi suriris aŭtobuson. “Ĉu mi povos atingi la rezidejon de la provinca partia komitato per tiu aŭtobuso?” demandis mi. La biletistino diris afable: “Jes, nur en distanco de du haltoj. Kaj mi vokos vin kiam nia aŭtobuso atingos la haltejon!” Apenaŭ finiĝis ŝia vorto, ŝi sin turnis al iu maljunulo malfacile suriranta la aŭtobuson. Ŝi tuj montris al li sidlokon dirante: “Jen, avo, sidigu ĉi tie proksime al la pordo.” La maljunulo danke balancis sian kapon kun rideto.

Rimarkinte la bonan sintenon de la biletistino, mi vizitis speciale la Aŭtobusan Kompanion de la urbo kaj aŭdis multajn rakontojn pli kortuŝajn.

Iun frumatenton, kiam aŭtobuso de linio 7-a ĵus forlasis la placon antaŭ la stacidomo, aŭdiĝis urĝa vokado post ĝi: “Haltu! Momenton atendu!” La aŭtobuso tuj haltis kaj malfermiĝis la posta pordo, tra kiu geedzoj en kamparanaj vestoj suriris la aŭtobuson spiregante. La viro, kiu portis surdorse sian palan filon, demandis: “Ĉu la aŭtobuso preterpasos hospitalon? Mia infano suferas akutan malsanon kaj bezonas urĝan kuracon!” La stiristo kaj biletistino diris unuvoĉe: “Jes, ni portos vin al hospitalo!” Sidiginte ilin sur antaŭajn sidlokojn la biletistino faris al la tuta pasaĝer-

aro klarigon kaj post tio la aŭtobuso kuris rekte al hospitalo. Post pluraj tagoj, la geedzoj kun la ĵus resaniĝinta infano hazarde denove suriris la saman aŭtobuson dum sia hejmenreveno. Ili danke diris al la biletistino: “Mia filo certe mortus, sen via helpo kaj ĝustatempa kuraĉo de la hospitalo!”

Estis pluva tago. 80-jara avino venis al la stacio de aŭtobuso de linio unua. Biletistino Ĉen Lin demandis: “Kien vi volas, avino?” La lasta diris, ke ŝi venis de Ĉongking de Siĉuan-provinco por vidi sian filon, sed ne klare memoris la nomon de lia laborloko kiu ŝajne nomiĝas ia buroo kaj estas atingebla per la aŭtobuso de linio unua. Iom cerbuminte Eta Ĉen diris: “Vi ne maltrankviliĝu, mi vin helpos.” Uzante sian ripoztempon post deĵoro ŝi suriris la aŭtobuson apogante la avinon. Survoje ŝi plurfoje eliris el la aŭtobuso kun la avino por pridemandi en la Akvoadministra Buroo, Grena Buroo kaj pluraj aliaj burooj, ĝis ili fine trovis la filon ĉe la Termezura Trupo de Ŝoseoj sub la Trafika Buroo. La avino diris emocie: “Bona knabino, vi oferis vian libertempon pro mi kaj eĉ malsekiĝis de la pluvo. Mi vin tre dankas!” Kapskuante Eta Ĉen diris kun rideto: “Ne diru tion, ĉar ĉion ĉi tion ja inkluzivas nia tasko!”

Kinejoj kaj teatroj sen bilet-kontrolistoj

Iun tagon, kiam mi vizitis la Liberigan Kinejon en la centro de la urbo, mi rimarkis, ke la spektatoroj iris en ĝin triope aŭ kvinope kaj neniu biletkontrolisto troviĝis ĉe la enirejo de la kinejo. Mi mire demandis al iu laboristo: “Kial neniu kontrolas bileton ĉe la enirejo?” Pri-

rigardante min li diris: “Certe vi venis de aliiloke! Nia urbo jam aplikas novan sistemon ekde januaro de la kuranta jaro.” “Ĉu oni ne timas ke iuj eniras sen bileto?” mi demandis. “Ne eble”, li diris, “post ripetada propagando oni jam sciis pri kaj kutimiĝis al tio.”

Enirinte la kinejon la spektantoj priserĉis sian sidlokon laŭ indiko de sia bileto. Regis kvieto kaj bonordo en la kinejo. Antaŭ prezentado de la filmo oni projekciis sur la ekranon diapozitivajn por komuniki la regulojn de la nova sistemo al la spektantoj. Post tio ekprezentiĝis filmo.

Antaŭ du jaroj kiam la “kvarpersona bando” havis fortan influon, malordo regis en la urbo Hefeĵ. Por pli detale informiĝi pri la afero mi vizitis la estron de la kinejo Su Gingsong.

Li diris, ke en la lasta aŭtuno, dum kritikado kontraŭ la “kvarpersona bando” kaj rebonigado de la socia ordo, la Kultura Buroo de la urbo okazigis kunvenon por diskuti la problemon de senkontrola eniro de spektantoj. Tiam iuj diris maltrankvile, ke antaŭ kelkaj jaroj, ĉiam svarmis homamasoj senorde antaŭ kinejoj kaj teatroj kaj estis tre malfacile teni la ordon. Ĉu apliko de senkontrola enlaso de spektantoj ne puŝos la aferon al neregebla ĥaoso?

La estro diris kun rideto: “Tiam, tiuj konsideroj ne estis sen kialoj. En la pasinteco, la malbonordo estis kaŭzita ĉefe de la influo de anarkiismo levita de la ‘kvarpersona bando’ kaj samtempe ni ne bone faris propagandon kaj organizadon.” Li diris, ke post ripetada diskutado kaj sufiĉa preparado, la Kultura Buroo, en la lasta decembro, anoncis al la tuta urbo kaj propagandis pri la boneco de senkontrola eniro de la spektantoj sub la kondiĉo ke oni devas agi laŭ la difinitaj konkretaj reguloj. Krome, ĵurnaloj, radio kaj bazaj unuoj de la tuta urbo propagandis pri tio, tiel ke ĉiuj urbanoj estis informitaj. La sistemo trovis varman subtenon de la vastaj amasoj, kaj la rezulto estas neatendite bona, ekde la provado.

Grupoj por lerni de Lej Feng

En publikaj lokoj de Hefeĵ kelkfoje oni povas vidi etajn servistojn, kiuj okupiĝas aŭ pri ven-

dado de varoj, aŭ pri balaado, aŭ pri purigado de aŭtobusoj, ktp. Iliaj konsciencaj laboroj estas tre kortuŝaj. Foje, en iu magazeno mi vidis kelkajn dekelk-jarajn knabinojn vendantajn varojn. Mi demandis la akompananton Ĝang de la Komerca Buroo: “Ĉu ili tiel etaj estas vendistinoj?” “Ne,” diris Ĝang kun rideto, “ili estas membroj de grupo por lerni de Lej Feng.” Post pridemando mi eksciis, ke ili estas lernantoj de la Dua Elementa Lernejo de la strato Huajhelu. Estis tago de Lej Feng por la lernejo, tial diversaj grupoj por lerni de Lej Feng faris bonajn aferojn ekster la lernejo post la leciono.

Lej Feng estis soldato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En 1963 Prezidanto Maŭ Zedong alvokis la tutan popolon lerni de li kaj ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj alte taksis Lej Feng, laŭdante liajn “klarajn klasajn starpunkton en amo kaj malamo, revolucionan spiriton de unueco inter vortoj kaj agoj, senegoisman stilon de komunismo kaj proletan sinforĝesan batal-spiriton”. Frue jam antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, Lej Feng estis modelo lerninda por la tuta popolo, precipe por la junuloj kaj infanoj. Sed, dum la tempo kiam Lin Biao kaj la “kvarpersona bando” estis en potenco, ankaŭ la movado de lerno de Lej Feng suferis ĝenadon kaj subfosadon, tiel ke nemalmultaj junuloj estis venenitaj de anarkiismo kaj iuj eĉ iris sur vojon de krimo. Post falo de la “kvarpersona bando”, la movado de lernado de Lej Feng denove disvolviĝis en mezlernejoj kaj elementaj lernejoj de Hefeĵ kaj aperis multaj bonuloj kaj bonfaroj.

Vang Ĝanglin estas lernanto de la Honghinga Elementa Lernejo. Foje, dum remado en parko li trovis monsaketon en la boato. Li pensis en si ke la perdinto certe tre maltrankviliĝas, kaj ke li devas agi kiel onklo Lej Feng kaj kiel eble plej rapide trovi la perdinton por redoni al li la monsaketon. Li tuj surbordiĝis salte de sur la boato. Post multa klopodado li fine trovis la perdinton en la parko. La perdinto prenis al Eta Vang la manon kaj diris: “Malgranda amiko, mi multe dankas vin, ĉar en tiu ĉi monsaketo troviĝas mia salajro, se vi ne redonus ĝin al mi, tre grandan malfacilon mi alfrontus!”



Amikeco sur alta neĝkovrata monto

de PAN ĈAŬ

EN majo de la kuranta jaro, montgrimpistoj de Ĉinio kaj Irano faris akomodan trejnadon por kune ascendi Ĝomolangma-n tra ĝia norda deklivo en la venonta jaro.

Nova "Silka Vojo"

Antaŭ pli ol du mil jaroj, karavanoj de ĉevaloj kaj kameloj de la du antikvaj civilizitaj landoj Ĉinio kaj Irano jam elhakis la fame konatan "silkan vojon" kaj faris amikan negocon pri iranaj naciaj metiartaĵoj kaj ĉinaj silkaĵoj. Hodiaŭ, en ascendo de la plej alta montpinto de la mondo la montgrimpistoj de la du landoj pavimas novan "silkan vojon" kaj konstruas novan monumenton de amikeco en unuiĝo, interhelpo kaj reciproka lernado.

Kiam arĝenta pasaĝera aviadilo surteriĝis sur la aerodromo de Ŝkaze sur la Tibeta Altebenajo, Kunga Pasang, vicestro de la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio, kiu iam ascendis Ĝomolangma-n, varme salutis ĉe la eskalo: "Bonvenon al vi, iranaj amikoj!" Azeez Deezajee, vicĉefo de la Irana Montgrimpa Ekspedicio ĝoje diris: "Ni venis en Ĉinion kvazaŭ en nian propran hejmon. Ni esperas, ke la kunlaboro plifortigos la amikecon inter niaj du popoloj." La sekvintan tagon post la medicina ekzamenado fare de ĉinaj kuracistoj, la iranaj amikoj

ekveturis al la kampadejo ĉe Ĝomolangma.

Niaj aŭtoj veturis de Dingji orienten, tie estas "Ĉina-Irana Amikeca Ŝoseo". La iranaj amikoj survoje faris multajn demandojn aprecante pejzaĝojn ekster la aŭto kaj la ĉinaj sportistoj respondis al ili unu post alia. Antaŭe, ĉi tie estis dezerta. La nomita ŝoseo estis konstruita en 1960, kiam la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio ascendis Ĝomolangma-n. Kvankam la ŝoseo estis rekonstruita en 1975, tamen pro lavado de neĝstormo kaj degelinta akvo ĝi fariĝis akvoplena kaj netrairebla. En marto de la kuranta jaro, por la akomoda trejnado de la


ĉinaj kaj iranaj montgrimpistoj, iu regimento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo rapidis tien por rekonstrui la ŝoseon spite neĝstormon kaj froston. Ili hakis rokmuron, ŝtopis la kavojn, eksplodigis glacieron kaj transportis ŝtonojn. Pro frosta ventego krevis la haŭto de iliaj manoj kaj vizaĝoj. Tamen ili firmdecide esprimis, ke ili nepre venkos, same kiel siaj prauloj en elhakado de la "silka vojo", malfacilojn kaj danĝeron kaj bone rekonstruos la Ĉinan-Iranan Amikecan Ŝoseon.

Bolanta Baza Kampadejo

Ekbolis la baza kampadejo ĉe la loko alta je 5,000 metroj super la

Interŝanĝo de donacoj





La ĉinaj kaj iranaj montgrimpestoj antaŭ montgrimpa trejnado

marnivelo. Tamtamado kaj tamburado skuis la montvalojn, kaj la bonvenigaj amasoj akklamis alvenon de la iranaj amikoj.

Azeez Deezajee, vicĉefo de la Irana Montgrimpa Ekspedicio entuziasme diris: "Mi estas tre ĝoja, ke mi vidis ĉi tie la plej karajn amikojn kaj kune vivas kun la herooj konkerintaj Ĝomolangma-n." Iuj iranaj amikoj tuj iris por foti la delonge aspiratan pejzaĝon de Ĝomolangma, forgesinte sian laciĝon de du-taga veturado de pli ol kvarcent kilometroj.

Nokto vualis. Por pli bone plenumi la trejnan taskon, la montgrimpestoj de la du landoj vizitis unu la alian, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis rido el la verdaj tendoj. La tendo n-ro 12 loĝata de interpretistoj estis multe vizitata. Ili inter-

parolis ĉefe pri montgrimpa tekniko. La iranaj sportistoj demandis la ĉinajn amikojn pri la karakterizaj de montgrimrado sur glacio kaj neĝo, la metodo de praktika ŝnur-nodado kaj tiel plu. La ĉina montgrimpesto Ĉen Gian-gjun opiniis, ke lia plej granda sukceso estas ellerni de la irana amiko Hosein Harasati novan metodon de surbrusta ŝnurnodado kaj la metodon de sida ŝnurnodado dum descendo sur rokdeklivo. La sida ŝnurnodado liganta la femurojn kaj ŝultrojn estas tekniko nepre posedenda por grimpestoj de altaj montoj.

Aziz Khalaj, la plej juna kaj vigla el la Irana Ekspedicio, ĝoje montris foton de sia edzino al la ĉinaj sportistoj. Oni ŝerce demandis lin: "Ĉu vi sopiras al la familio?" Li serene ridis, dirante: "Ĉi

tie mi estas kvazaŭ en mia propra hejmo. Miaj gepatroj kaj karuloj certe ne maltrankviliĝas pri mi." Montrante la foton li diris: "Ankaŭ ŝi estas montgrimpestino, tial mi kunportis 'ŝin'. Mi volas scii, ĉu ŝi havas altmontan reakcion." Ĉe tio ĉiuj ekridis.

Dum Marŝado

La 12-an de majo, la ceremonio de kuna montgrimpa trejnado de Ĉinio kaj Irano okazis ĉe la piedo de Ĝomolangma. La 53-jara generalo Mohamad Khakbeez, ĉefo de la Irana Ekspedicio, alrapidis por ĉeesti la ceremonion. La naciaj flagoj de Ĉinio kaj Irano estis lante hisataj en la melodio de la naciaj himnoj. Vang Fuĝoŭ, estro de la Ĉina-Irana Kuna Montgrimpa Ekspedicio, proklamis montrante la

majestan montpinton: “Marŝu al Ĝomolangma!” La montgrimpistoj ekmarŝis al la plej alta montpinto de la mondo per fortaj kaj firmaj paŝoj.

Trapasinte ravinon plenan de falintaj ŝtonoj kaj transirinte gruzozajn montetojn, la sportistoj ripozis en ebena loko por tagmanĝo, de kie ili povis vidi glaciajn kolonojn en la foro. La sportistoj elprenis ĉinajn sufleojn, kokajon, fiŝojn, buteron, limonadon . . . kaj iranajn kukojn, salitajn kukumojn, daktilojn, pistakojn, figojn . . . Antaŭ tri tagoj kiam la Irana Ekspedicio aranĝis ekspozicion de montgrimpaj ekipaĵoj kaj manĝaĵoj, la iranaj amikoj foje refoje petis la ĉinajn sportistojn gustumi la manĝaĵojn kaj demandis pri ilia ŝato por kunporti pli multe da ŝatataj manĝaĵoj. Vang Ĝenhua, vicedestro de la ĉina teknika grupo, diris: “Post la gustumo, laŭ mi, ĉio devas esti kunportata.” M. J. Asadee, estro de la kuna trejna grupo kaj vicedestro de la irana teknika grupo, diris: “Sur la monto la sportistoj de la du landoj manĝos kaj la ĉinajn kaj la iranajn manĝaĵojn. Ni kune kunportos la amikecon al la monto!” Nun ili vere kune manĝis kaj eĉ komune uzis kulerojn. Kiel intimaj kaj amikaj ili estis.

Asadee falis ĉe ekiro de la unua kampadejo kaj sangis je la dekstra kruro. Rimarkinte tion, kuracisto bandaĝis lian kruron kaj admonis lin malsupreniri por ripozi. Li sincere diris al la kuracisto: “Tre peza estas la trejna tasko. Mi estas estro kaj ne devas meti ĉiujn ŝarĝojn sur la ĉinan vicedestron.” Tio forte kortuŝis la vicedestron Samĝub, kiu fiere diris: “Kun tia amiko ni espereble sukcesos ascendi la montpinton en la venonta jaro.”

Apud la dua kampadejo estas multaj glaciaj kolonoj. La fortega

sunradio de la altebenaĵo faris glaciŝiriveron en neĝglacian koridoron kun diversformaj kolonoj. Rigardate de fore sennombraj glaciaj kolonoj similas al densa arbaro. La unuaj staras kiel ĉielosubtenaj kolonoj, la duaj aspektas kvazaŭ kristalaj palacoj kaj la triaj portas la figurojn de pando, foko kaj cigno. . . Tion rigardante oni sentas sin kvazaŭ en mita mondo!

La altmonta ventego kaj bruliga suno mordis haŭton de la sportistoj. La lipoj de iuj krevis pro sekeco. Rimarkinte, ke la vizaĝo de ĉina sportisto Vang Hongbaŭ ne estis ŝmirita per sunimuna oleo, irana sportisto Ara K. Karami tuj elprenis la oleon el sia dorsosako kaj ŝmiris al li la vizaĝon. Dum la peniga montgrimpado la sportistoj de la du landoj starigis inter si profundan amikecon.

Noktiĝis. La sportistoj retrorigardis la travivaĵon dum la tago. Flugis el tendoj ĉarma kanto en la persa lingvo:

*Al Ĉinio venis filoj de Irano
por surgrimpinti pinton Ĝomolangma
kune
kun amikoj ĉinaj. Kantas ni
samvoĉe
dum ĝojtemp'. Kaj interhelpas ni
en malfaciloj.
En komuna entrepren' ni ligas
nin intime.
Por eterne brilos nia amikec'
batala.
. . .*

Transpasi “Danĝeran Zonon”

Frumatene de la 18-a de majo, la Ekspedicio ekmarŝis al Bej-aŭ.

Bej-aŭ estas la plej danĝera zono sur la vojo al la pinto de Ĝomo-

langma. Ĝia bazo altas je 6,600 metroj super la marnivelo kaj ĝia supro je 7,050 metroj. Kiel giganta glacimuro ĝi transverse kuŝas sur la vojo de grimrado, kvazaŭ Dio gardus la montpinton de Ĝomolangma. Ĝia kruteco superis 45 gradojn kaj eĉ atingis 60 gradojn. Sur ĝi troviĝas multaj videblaj kaj nevideblaj fendoj, kaj glacifalo kaj lavango povas okazi eventuale. Iuj fremdlandaj esploristoj ŝtele venintaj en la pasinteco mortis sub tiu glacimuro, tial ĝi portis la titolon de “Blanka Dio de Morto”. La Ĉina-Irana Kuna Montgrimpa Ekspedicio ankaŭ prenis la konkeron de Baj-aŭ kiel gravan operacion de la kuna trejnado. La montgrimpistoj ĉiuj estis plenaj de memfido kaj decidis nepre ascendi “la plej danĝeran zonon” en unuanima kunlaborado. Por grimpi la lastan neĝglacian krutan deklivon de pli ol tridek metroj, oni nepre devas firme kapti per la manoj metalan ŝtupetaron kaj premi la bruston al la glacimuro. Ioma neglekto kaŭzos mortigan falon. Tiam la ĉina sportisto Apĉen kiu iam ascendis la montpinton de Ĝomolangma, la unua grimpis sur la glacimuron. Atinginte la supron, li enigis en neĝglacian la montgrimpan pioĉon volvitan per nodŝnuro. Poste du ĉinaj ekspedicianoj kun unu irana ekspediciano inter si ascendis per metala ŝtupetaro paŝon post paŝo. Je ĉiu ilia paŝo Apĉen suprentiris pecon da ŝnuro. Pro altmonta frosta ventego Apĉen ne povis firme stari sur la piedoj, tial li kuŝiĝis surventre sur neĝo por firme teni la ŝnuron. Kiam la 39 ekspedicianoj ascendis la supron de Bej-aŭ, Apĉen jam rigidiĝis de frosto. La irana sportisto Harasati kortuŝiĝis de tio kaj forte premis Apĉen en sian sinon.

Kiam la triumfa informo flugis al la baza kampadejo, generalo Mohamad Khakbeez ĝoje diris, ke



Interŝanĝi sperton pri ŝnurnotado

tiom da sportistoj kune ascendis montpinton kun absoluta alteco de 7,000 metroj, tio estas malofta en la montgrimpa historio de la mondo. Bej-aŭ unuafoje bonvenigis fremdlandajn amikojn — Jalal Foroozan, Mojtaba Mazahery, Hosein Harasati kaj Ara Karam Karami de Irano.


Post konkero de Bej-aŭ, 11 el ili kiuj ankoraŭ havas forton, postulis surgrimpi pli alten. Post ripozo ili daŭre marŝis al la loko kun absoluta alteco de 7,500 metroj. La grupo gvidata de la ĉina sportisto Vang Hongbaŭ marŝis en la fronto por elhaki vojon kaj instalii ŝnuraron sur kruta deklivo. Ĝin sekvis la grupo gvidata de la irana sportisto Jalal Foroozan. Muĝis montventego kaj brulis la suno. Dum pli ol kvinhora peniga grim-pado ili forte soifis. Kiam la ekspedicianoj de la du grupoj atingis la lokon kun absoluta alteco de 7,500 metroj, ili ĝoje manpremis kaj

brakumis unu la alian. Vang Hongbaŭ elprenis el la sino sian solan pomon kaj transdonis ĝin al Foroozan. Ili cedis ĝin reciproke, kaj fine Foroozan dividis la pomon en du pecojn per montgrimpa pioĉo kaj enmanigis unu el ili al Vang Hongbaŭ. En la tempo, kiam la lasta grupo preskaŭ atingis la lokon altan je 7,500 metroj, malstreĉiĝis la kojna metalpeco sur la maldekstra boto de la irana ekspediciano Mazahery. Sed li ne povis klini sin por ĝin streĉi. Se li ne firme tenus la rok-muran deklivon per la du manoj, li rulfalus. Tion rimarkis ĉina sportisto Ŝang Ziping. Kvankam tiu veterana montgrimpisto klare sciis, kian danĝeron li riskos, se li liberigos siajn manojn por savi alian, tamen li decideme demetis siajn anaslanugajn gantojn, firme premis sian korpon al la rokmuo kaj pene streĉis la kojnan metalpecon de Mazahery. Ili ambaŭ ridete rigardis unu la alian kaj daŭre marŝis.

Nau ĉinaj kaj du iranaj ekspedicianoj fine kuniĝis ĉe la loko kun absoluta alteco de 7,500 metroj. Kiam Foroozan raportis per radiotelefono al la estro de la kuna trejna grupo en la kampadejo n-ro 3, Asadee diris ne tre flue en la ĉina lingvo: “Saluton al Vang Hongbaŭ! Amikecon!” Vang Hongbaŭ respondis en la persa lingvo: “Amikecon kaj venkon!”

Adiaŭo

En la profunda nokto de la 7-a de junio, sur la aerodromo de Pekino la montgrimpisto de Ĉinio kaj Irano babilis pri la ĉijara aranĝo kaj decido por la venonta jaro. Foroozan diris: “Reveninte hejmen mi nepre pli energie min trejnos kaj klopodos por ascendi la plej altan montpinton venontjare por la amikeco de la du popoloj.” La amikeco vivas por eterne. La antikva “silka vojo” ĝis nun ankoraŭ vibrigas iliajn korojn. La iranaj amikoj ne povis kunporti neĝon kaj glacieron de Ĝomolangma al sia hejmlando, ili do aĉetis multajn ĉinajn silkaĵojn. Tio ne nur estas bona memorajo pri la bela pasinteco, sed ankaŭ prezentas aspiron al la estonteco kaj nova amikeco. La sportistoj de la du landoj brakumis unuj la aliajn. Adiaŭante, ili firme esprimis, ke en la venonta majo ili nepre starigos la naciajn flagojn de la du landoj sur la plej alta montpinto de la mondo.




Kulturaj Kontaktoj

ĈINA-AŬSTRALIA SCIENCA SIMPOZIO

La Ĉina-Aŭstralia Simpozio pri Plantohista Kulturado okazis majon en Pekino kiel ero de la scienca interŝanĝa programo inter la du sciencaj akademioj de Ĉinio kaj Aŭstralio. Ĝin ĉeestis pli ol 50 sciencistoj el dek landoj, nome Aŭstralio, Kanado, la Federacia Respubliko de Germanio, Finnlando, Francio, Japanio, la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, Rumanio, Britio kaj Ĉinio.

En la simpozio estis legitaj dekoj da disertatoj. Hu Han, estro de la Genetika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj raportis pri "Studo pri Polena Kulturado", D-ro Fossard, profesoro de la Botanika Fakultato de la Nov-Englanda Uni-



D-ro Fossard de Aŭstralio en la scienca simpozio

versitato de Aŭstralio raportis pri "Generado de Ĝardena Planto per Histokulturado — Malproksimaj Specioj, Rapideco de Generado kaj Kalkulo de Produkta Kosto", profesoro. J. Jamada de Agrokemia Fakultato de la Kiota Universitato de Japanio raportis pri "Baza Studo kaj Apliko de Histo-kulturado" kaj "Nuklea Dividiĝo", kaj D-ro N.

Sunderland de la instituto de John-Innes, Britio, raportis pri la "Vojo por Altigi la Efikecon de Polena Kulturo". Tiuj raportoj vekis intereson kaj atenton de la ĉeestantoj.


VIZITO DE BIRMAJ ARTISTOJ AL ĈINIO

En la varma julio la Kultura Ensemblo de Birmo venis al Ĉinio kaj faris prezentadojn en Pekino, Kantonon k.a. urboj. Iliaj prezentadoj ĉu muzikaj aŭ dancaj estas brilaj kaj variaj, kiel gemoj, kiujn riĉe produktas la lando. Ili estas riĉaj je vivspiro kaj aparta nacia stilo.

La prezentado komenciĝis per "Uverturo Bonveniga" ludita per naciaj muzikiloj. La virtuozececo de la muzikistoj tre ravis la spektantojn. Kaj la dancaj pecoj havis sian apartan koloron, kiel ekzemple la interesa "Danco de Elefantkrura Tamburo", la poezieca danco "Vespero en Vilaĝo", la klarritma "Danco kun Klakilo kaj Tintilo" kaj la gaja "Kofrodanco" plena de saltoj ktp. Ili ĉiuj profunde impresis la ĉinajn spektantojn.

Birma danco "Persekuti Cervon en Arbaro"





GRANDEGA DIAMANTO TROVITA EN ĈINIO

En nia lando oni trovis grandegan diamanton kaj Prezidanto Hua titolis ĝin "Ĉanglin".

La diamanto pezas je 158.7860 karatoj (5 karatoj = 1 gramo). Ĝi estas diafana, helflava kaj brila. Ĝi estas la plej granda el la naturaj diamantoj trovitaj en nia lando.

En la 21-a de decembro de 1977, Vej Ĝenfang, komunumanino de Ĉanglin-brigado de Linŝu-gubernio en Ŝandong-provinco, trovis la diamanton dum laborado sur kampo. Ricevinte ĝin, ŝi konsiliĝis kun siaj familianoj kaj decidis donaci ĝin al Prezidanto Hua kaj la ŝtato.

Pro sia patriota spirito, Vej Ĝenfang ricevis laŭdon kaj premion de la popola registaro.

La Ĉina Akademio de Sciencoj invitis koncernajn instituciojn fari



kompletan ekspertizon al la diamanto. Ĝi opiniis, ke la trovo de la diamanto sur profund-faŭlta zono de nia lando ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko havas gravan signifon por studi sciencojn pri la tergloba kaj medion de la formiĝo de natura diamanto kaj serĉi ĝian minon.

NOVAJ PLANTOJ ELKULTURITAJ PER ATOMENERGIO

En la lastaj jaroj, nia lando elkulturis ĉ. 100 novajn speciojn de rizo, tritiko, kolzo, arakido, brasiko k. a., utiligante atomradion kaj atomradian hibridigon. La elkulturitaj plantoj havas superecon de frua maturiĝo, alta produktokvanto kaj forta kapablo kontraŭ malsanoj kaj naturaj katastrofoj. La kultura areo de tiuj plantoj atingis pli ol 1,600,000 hektarojn.

En 1957, starigis la unua agrikultura esplor-sekcio de atomenergia utiligo de nia lando. De tiam la plejparto de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio starigis sian laboratorion ekipitan per radiatoroj kaj izotopaj esploraj instrumentoj. La laboro de tiuj fakuloj ricevis subtenon kaj helpon de kamparanoj-aktivuloj de scienca eksperimento.


La nova specio de rizo "Juan-fengzaŭ", elkulturita per radia metodo, maturiĝis je 45 tagoj pli frue ol ĝia originala specio kaj ĝia produktokvanto pliiĝis je 10% kompare kun tiu de aliaj specioj samtempe maturiĝantaj. Ĝia lisino estas je 8-14% pli multa ol tiu de aliaj specioj. Lisino estas plej grava nutroza aminoacido.

NOVAJ KUREJOJ DE LA ĈEFURBA AERODROMO

Jam finkonstruitaj estas la novaj kurejoj de la plivastigata Ĉefurba Aerodromo en la orienta antaŭurbo de Pekino. La taga kaj nokta provflugo de plurtipaj aviadiloj pruvis, ke la ferbetonaj kurejoj estas bonkvalitaj kaj ĝiaj precizaj instrumentoj por ekflugo kaj surteriĝo bone funkcias kaj atingis la postulon de projekto.

Post funkciado de la novaj kurejoj, ankaŭ ĝiaj malnovaj kurejoj estos plivastigitaj por kontentigi la bezonon de la enlandaj kaj internaciaj aerlinioj.

Nun nova domo por pasaĝer-atendejo kaj direkta centro estas en streĉa konstruado. Post finkonstruiĝo la moderna direkta centro posedos ekipaĵojn kaj kapablon trioble pli multe ol la nuna.



En Pekino

LA bela Hiangŝan-monto estis imperiestra parko fame konata pro sia kovriĝo per ruĝaj foliaroj de arboj en la malfrua aŭtuno. Hiangŝan fakte estas monteto de Jansan-montaro, situanta en la okcidentaj pitoreskaj lokoj de Pekino. Sur la montsupro troviĝas du grandaj ŝtonoj similaj al incensuoj kaj ofte ŝvebas nebulo kaj nuboj, kiuj de malproksime vidiĝas kvazaŭ leviganta fumo el incensujo, tial oni nomis la monton Hiang (incensa) ŝan (monto). La parko estas ĉirkaŭprenata de montoj en tri flankoj, kaj en ĝia meza parto troviĝas kvieta valo kun densaj arbaroj. Ĝi vere estas agrabla someruma loko. En la lastaj jaroj de la 12-a jarcento Gin-dinastio konstruis tie majestan budhisman Hiangŝan-templon. De tiam ĝi fariĝis fama vizitindejo. En la dinastioj Gin, Juan kaj Ming, budhismaj kredantoj kaj ekskursantoj de Pekino kaj ĝiaj najbaraj lokoj venis al ĝi dum la templa foiro, por pilgrimado kaj rigardo de artaj prezentadoj, pejzaĝoj kaj aliaj vizitindejoj.


En la 18-a jarcento la imperiestro de King-dinastio Kianlong ekamis tiun lokon kaj difinis ĝin kiel unu el la ok famaj pejzaĝoj de la ĉefurbo. Nun sur la monto ankoraŭ staras ŝtonplato kun ideografiaĵoj

Hiangŝan-monto

de JANG HONGHJUN*

skribitaj de la imperiestro Kianlong en signifo de "Okcidenta Monto en Postneĝa Sereniĝo". En serena tago post neĝado, rigardante de Pekino al

la malproksimaj okcidentaj montoj oni trovas, ke el ili la plej blanka kaj aminda estas Hiangŝan-monto. Tamen pekinanoj des pli amas la




1. Donggong-pordo
2. La restoracio Hiangŝan
3. La ruinigita Hiangŝan-templo
4. Ruĝfolia Arbaro
5. Senjuhu-pejzaĝo
6. La Incensuja Montpinto
7. "Okcidenta Monto en Postneĝa Sereniĝo"
8. Tjunŝanguan-vilao
9. Juhuaŝanguang-vilao
10. Glazura Pagodo
11. Ĝaŭmiaŭ-templo
12. Gianhingaj-korto
13. Bejgong-pordo
14. Bijun-templo

aŭtunan Hiangŝan-monton kovratan per ruĝaj kaj flavaj folioj de dense kreskantaj aceroj kaj *Cotinus coggryia scop.* borderitaj per malhele verdaj pinoj kaj cipresoj. Tiutempe ĝi ŝajnas pli ĉarma ol en printempo kun buntaj montfloroj.

En la regtempo de Kianlong, Hiangŝan fariĝis imperiestra parko kun la nomo Gingjijuan. Oni konstruis en ĝi multajn palacojn, templojn, kioskojn, altanojn, ŝtonajn pordojn, surakvajn kaj aliajn konstruaĵojn por ornami la parkon. Tiam la pejzaĝoj de la okcidenta antaŭurbo de Pekino preskaŭ ĉiuj estis okupataj de la imperiestra familio. Ili konsistis el la kvin parkoj Kingjijuan (nun la Somera Palaco) de Vanŝouŝan-monto, Gingmingjuan de Jukjuanŝan-monto, Gingjijuan de Hiangŝan-monto, Ĉangĉunjuan kaj Juanmingjuan. Post kiam imperiestro Kianlong faris plurfojan turisman inspektadon al la suda Ĉinio, li ordonis, ke oni konstruu en la kvin parkoj pejzaĝojn, imite al la lokoj de li viditaj

Bijun-templo



kaj ŝatataj. Tial la kvin parkoj tiam estis la plej belaj en nia lando. En 1860 kaj 1900 imperiismaj trupoj dufoje invadis Pekinon, kaj tiuj parkoj suferis seriozajn prirabadojn kaj bruligon. Post incendio el la konstruaĵoj de Hiangŝan restis preskaŭ nenio. Pro sia kadukiĝo kaj pro malproksima situo de la parko, King-dinastio ne plu faris al ĝi grandskalan rekonstruadon. La nunaj konstruaĵoj en la parko plejparte estis konstruitaj post King-dinastio.

La ĉefaj konstruaĵoj kaj pejzaĝoj nun en la parko estas jenaj:

Gianhingaj-korto kiu situas en ĝia nordo, estis konstruita de imperiestro Giaking en la lastaj jaroj de la 18-a jarcento kaj rekonstruita poste. En la korto troviĝas duoncirkla baseno, kaj okcidente de ĝi estas la ĉefa konstruaĵo Gianhingaj kaj en la aliaj flankoj duoncirkla koridoro. Post Gianhingaj estas artefaritaj montetoj el ŝtonoj kaj arbaro kun kioskoj.


Ĝaŭmiaŭ-templo estas grupo da konstruaĵoj imititaj al tibeta budhisma templo. Ĝi konstruiĝis en 1780 speciale por tibeta budhisma

gvidanto Banĉan, kiu venis al Pekino por peti aŭdiencon ĉe la imperiestro de King-dinastio. Nun al ĝi restas nur granda ruĝa altano kun alteco de ĉ. 10 metroj. Oriente estas blankŝtonaj kolonbazoj kaj pordego konstruita el flave kaj verde glazuritaj brikoj kaj tegoloj. Sur la okcidenta monttalo staras septaĝa budhisma pagodo konstruita el glazuritaj brikoj kun eleganta formo kaj buntaj koloroj. Sur ĝiaj ĉiuetagaj suprenlevitaj tegmentanguloj pendas kupraj sonoriloj, kiuj tintas sonore en vento kaj per tio pliiĝas al ĝi kvietan etoson.

Senjuhu-pejzaĝo estas natura vindaĵo kun krutaj rokoj, en kies fendoj kreskas arboj kun kuriozaj pozoj.

Incensuja Montpinto estas la ĉefa pinto de Hiangŝan-monto. Por vekigi intereson de ekskursantoj oni donis al ĝi troigitan nomon Gujgianĉou, kiu signifas, ke ĝi estas alta kaj kruta, kaj malfacile grimpebla pro kio ĉagreniĝas eĉ diabloj. Sur ĝi estas du grandaj ŝtonoj similaj al incensujo. Ascendinte la pinton oni povas vidi, ke en la verda valo troviĝas oraj tegmentoj de antikvaj konstruaĵoj; en malproksima fono

La Memora Halo de S-ro Sun Jatsen





La pordego antaŭ Ĝaŭmiaŭ-templo

Jongding-rivero, kvazaŭ blanka rubando, fluas suden el la okcidenta ravino kaj nebule videblas la fame konata Lugoŭ-ponto super la rivero; en la malsupre proksima loko oni povas klare vidi Jukjuanmonton, Ŝigingŝan kaj la Someran Palacon. En serena tago oni eĉ povas vidi la kvartalojn de Pekino.

Krome, en la parko sin trovas ankaŭ pluraj restaĵoj de antikvaj konstruaĵoj kaj aliaj vizitindaĵoj. Ĉe la montpiedo estas restoracio Hiangŝan kaj aliaj.

La parko estas ĉirkaŭata de muroj konstruitaj en la regtempo de imperiestro Kianlong. Tiu imperiestra parko kaj ĝiaj vizitindejoj estis konstruitaj kaj aranĝitaj konforme al naturaj pejzaĝoj de la monto. La ĉefa ekskursiva linio nun estas: Enirinte Donggong-pordon en oriento vizitantoj iras suden al

la vilao Suangking kun du fontoj laŭ vojo pavimita per ŝtonplatoj. De tie norden oni venas al la ruinigita Hiangŝan-templo, plu nordokcidenten al la vilao Juhuaŝanĝuang, kie estas manĝaj-vendejo kaj tetrinkejo. De tie okcidenten, preterpasinte pejzaĝojn Senjuhu kaj Ĉaŭjangdong oni jam povas surgrimpi la Incensujan Montpinton. La malsuprenira linio estas: Preterpasinte la ŝtonplaton "Okcidenta Monto en Postneĝa Sereniĝo", oni povas veni al la vilao Tijunŝanguan. En malfrua aŭtuno ĝi estas bona loko por apreci ruĝajn foliarojn kovrantajn la sudokcidentan montodeklivon similajn al buntaj brokatoj. De tie plu malsupren oni povas atingi la sepetaĝan budhisman pagodon, Ĝaŭmiaŭ-templon kaj Gianhingajkorton. Pli norde estas Bejgongpordo. Elirinte de ĝi oni povas viziti Bijun-templon en najbareco.

Bijun-templo konstruiĝis en 1366. En la 16-a jarcento oni faris al ĝi dufojan pligrandigon. En 1748 imperiestro Kianlong farigis al ĝi grandskalan plikonstruon. Tiam oni ĉefe konstruis al ĝi sudan korton kun arĥana halo, imitante al Gingci-templo ĉe la Okcidenta Lago de Hangĝoŭ, kaj la vajran pagodon post la templo.

Nun Bijun-templo fundamente konservas la skalon post tiufoja pli-

Glazura Pagodo
(pentrita de Ĝoŭ Feng)



konstruo. De la orienta templa pordo ĝis la vajra pagodo, la templo estas en iom-post-iom altiĝanta situo laŭ montodeklivo, la lasta pli altas je 100 metroj ol la antaŭa. La dua fronta korto estas la ĉefa konstruaĵo de la templo, kie estas du orfiŝaj lagetoj, ŝtonponto, blankŝelaj pinoj, ginkoj kaj du sutraj ŝtonfostoj. Ĝia ĉefa halo konstruiĝis en Ming-dinastio. La Arĥana Halo en la suda korto estas originala budhisma konstruaĵo, en kiu troviĝas 508 skulptitaj arĥanoj kun malsamaj pozoj. Estas tre interese, ke oni skulptis sur trabo malgrandan bonzon Gigong**. Ankaŭ li origine estis arĥano, ĉar li alvenis malfrue kaj la sidlokoj estis okupataj de la aliaj, tial li devis resti sur la trabo. En la norda flanko de la templo estis korto, kies ĉambroj servis al la vizitantaj imperiestroj kiel ripozejo. Post ĝi sin trovas tre kvieta ĝardeneto kun murmuranta fontakvo el ŝtonaj fendoj, tial ĝi portas la nomon Fonta Korto. Tie troviĝas ankaŭ Tri-fea Kaverno kaj kurioza arbo.

En la tria fronta korto estas la Memora Halo de S-ro Sun Jatsen — nia granda revolucia pioniro. La halo pasinte kadukiĝis kaj tie konserviĝis nur unu malnova foto de Sun Jatsen kaj difektitaj florkronoj. Post la Liberiĝo la popola registaro riparigis ĝin. En ĝi metiĝas busto de Sun Jatsen kaj liaj skribaĵoj kaj verkoj. En la orientaj kaj okcidentaj ĉambroj de la halo eksponiĝas valoraj fotoj pri lia revolucia aktivado kaj komando de bataloj en la periodo de la demokratia revolucio.

La vajra pagodo post la memora halo estas la plej malantaŭa kaj alta parto de la templo. Ĝi altas 34.7 metrojn. Sur la trietaĝa bazo staras 5 kvadrataj pagodoj, 2 lamaaj pagodoj kaj eta vajra pagodo. La ok pagodaj pintoj formis variajn

konturojn. Ili ĉiuj konstruiĝis el ŝtonoj kaj surhavas multajn reliefojn pri budhismaj temoj. Antaŭ la pagodo staras blankŝtona pordo larĝa je 34 metroj kun multaj reliefoj. Tiu grupo da konstruaĵoj vere estas artaĵo kombinanta gravuran kaj arkitekturan artojn. Post forpaso de S-ro Sun Jatsen en la 12-a de marto de 1925, lia ĉerko iam metiĝis en la vajran pagodon, kaj en majo de 1929 translokiĝis al Nankino. La ĉapo kaj vestoj de Sun Jatsen konserviĝas nun ankoraŭ en la pagodo por memoro. De tiam la pagodo portas alian

nomon "Tombo de Ĉapo kaj Vestoj de S-ro Sun Jatsen".

** Li estas esplor-laboranto de la Arkeologia Instituto de la Ĉina Sociologia Akademio.*

*** Gigong estas bonzo reenkarnginta el arĥano en la ĉina mita romano "La Vivo de Gigong". La romano diras, ke li estas multe ŝatata de popolamasoj pro sia profunda simpatio al malriĉuloj kaj homoj trafitaj de maljustaĵoj kaj siaj moko kaj punoj al maljustaj ŝtataj oficistoj.*



Pavilono "Blankŝela Pino" (pentrita de Ĝou Feng)



La hanoj

de CAJ MEJBIAŬ

LA Ĉina Popola Respubliko estas unuigita lando kun entute 55 naciecoj. La hanoj konsistigas 94% de la tuta loĝantaro kaj vivas en 30 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj.

Antikvaj legendoj diras, ke la gentoj Huangdi kaj Jandi vivintaj en la centra parto de Ĉinio estis la praavoj de la hanoj. “Di” origine estis la titolo de ĉefo de aliancaj triboj. Laŭ objektoj eltrovitaj en arkeologia prifosado, antaŭ pli ol 3,000 jaroj a. K., la gentoj Huangdi kaj Jandi estis du malsamaj tribaj aliancoj. Ili disvolviĝis, en komuna vivo kaj batalo, en hua-naciecon de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (de la 8-a ĝis la 5-a jarcento a. K.).

En tiu periodo aperis multaj princaj regnoj, kiuj ofte interbatalis. Sed la loĝantoj en malsamaj regnoj de la centra Ĉinio formis inter si komunan lingvon kaj kulturon. Tiu kulturo devenis de Ĝou-dinastio (de la 11-a ĝis la 8-a jarcento a. K.) antaŭ la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Tiam oni rigardis ruĝon kiel la plej noblan koloron. Pro tio la loĝantoj de la centra Ĉinio nomiĝis “hua” (t. e. ruĝo). Ĝiaj najbaraj naciecoj iom post iom akceptis, en batalo kaj kontaktiĝo, la kulturon de hua-nacieco kaj fariĝis ĝia parto. En la lastaj jaroj de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno, hua-nacieco jam fariĝis la plej po-

tenta. Kaj poste ĝi fariĝis nuna han-nacieco.

La nomo han-nacieco devenis de la reg-periodo de Han-dinastio. En la jaro 221 a. K. Kin-dinastio unuigis la tutan Ĉinion kaj fondis aŭtokratisman feŭdan ŝtaton, sed post nur 15 jaroj ĝi estis renversita de

kamparana ribelo. Surbaze de la unuigita ŝtato de Kin-dinastio, Liu Bang, la gvidanto de la ribelantaj kamparanoj fondis tiun de Han-dinastio. De tiam finiĝis la longtempa ĥaosa situacio de multregneco, komenciĝinta de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno. La teritorio

La maŭzoleo de Huangdi





*Ornamajo sur tegolo
de Han-dinastio*



*Ideografiaĵoj sur
testuda ŝelo*

de Han-dinastio inkluzivis nordokcidente la hodiaŭan Hingiang-regionon, nordoriente la nunajn nordorientajn provincojn, sudokcidente la nunan Junnan-provincon kaj sudoriente la Ĉinan Sudan Maron. Hua-nacieco vivanta en la vasta kaj unuigita lando plie grandigis sian influon de kulturo kaj estis nomata han-nacieco. Noto de la 2-a jaro p. K. konstatis, ke Han-dinastio havis proksimume 60,000,000 loĝantojn, kiuj preskaŭ ĉiuj estis hanoj.

En sia posta disvolviĝo, han-nacieco dufoje kreskegis kaj kunfandiĝis kun aliaj naciecoj.

La unua fojo okazis en la Periodo de 16 Regnoj kaj la Nordaj kaj Sudaj Dinastioj (de la 3-a ĝis la 6-a jarcento). En tiu periodo iuj nordaj nomadaj naciecoj, inkluzive de la hunoj, ĝje-oj, di-oj, ĉjang-oj kaj ŝjanbej-oj, eniris unuj post aliaj en la basenon de la Flava Rivero kaj fondis plurajn regnojn tie en iuj lokoj. En la fino de la 4-a jarcento la nobelo de ŝjanbej-oj Tuopaŝi konkeris tiujn regnojn kaj fondis tie la Nordan Vej-dinastion. Iuj hanaj nobeloj loĝantaj en la nordo transiris suden al la baseno de Jangzi-

rivero kaj tie fondis sinsekve la dinastiojn Song, Ki, Liang kaj Ĉen, alinome la Sudajn Dinastiojn. La nordaj nomadaj naciecoj starigis sian regadon super la hana popolo en la baseno de la Flava Rivero, sed ili iom post iom akceptis la progresan kulturon de la hanoj kaj fine ankaŭ ilian lingvon. Tiuj nordaj nomadaj naciecoj, inkluzive de la potenca ŝjanbej-nacieco, iom post iom kunfandiĝis kun han-nacieco en tiu periodo kaj fariĝis ĝia nedisigebla parto. En 581 p. K. la Nordaj kaj Sudaj Dinastioj estis unuigitaj en Suj-dinastion, en kiu han-nacieco daŭre disvolviĝis

La dua fojo okazis en la periodo regata de la dinastioj Song, Liaŭ, Gin kaj Juan (de la 10-a ĝis la 13-a jarcento). En la komenca periodo de la 10-a jarcento, la kidan-oj en la baseno de Huanghe-rivero (la nuna Hilamulun-rivero) fondis la potencon Liaŭ-dinastion en norda kaj nordorienta Ĉinio rivale kontraŭ la registaro de Song-dinastio de hanoj en Kajfeng de Henan. En la komencaj jaroj de la 12-a jarcento la njuĝen-oj en la basenoj de la riveroj Hejlong kaj Songhua fondis

la potencon Gin-dinastion, ekstermis Liaŭ-dinastion kaj starigis sian regadon en la vasta regiono norde de la Flava Rivero. Song devigite translokigis sian ĉefurbon suden al Hangĝou. En tiu periodo la naciecoj ofte faris inter si militon kaj intensigis la reciprokan kontaktiĝon. Kiel la ŝjanbej-oj, tiel ankaŭ la kitan-oj kaj njuĝen-oj, post eniro en la regionon de la hanoj, iom post iom akceptis iliajn kulturon kaj lingvon kaj geedziĝis kun ili. Ankaŭ aliaj nordaj nacimalplimultoĵ tiam kunfandiĝis iom post iom kun la hanoj. En la mezo de la 13-a jarcento la mongola nacieco sinsekve pereigis la dinastiojn Gin kaj Song kaj fondis la unuigitan Juan-dinastion. Dum la regado de Juan, la kitan-oj, njuĝen-oj kaj aliaj nordaj naciecoj diferencis de la hanoj tiel malmulte, ke ili ĉiuj estis nomataj hanoj. Han-nacieco refoje ensorbis alinaciecajn loĝantojn kaj grandiĝis.

Laŭ nekompleta statistiko en la 18-a jarcento, la diversnaciecaj popolanoj de Ĉinio regataj de King-dinastio nombriĝis entute 400,000,000, el kiuj pli ol 90% estis

hanoj. El la diversaj naciecoj de Ĉinio, la hanoj ĉiam estis la plej multnombra nacieco kun la plej alta kulturo.

La hana skriba lingvo devenis de hieroglifo kaj prezentis diversajn figurojn per simplaj desegnoj. Poste oni aplikis iujn signojn kiel sonsignojn, kiuj kune kun hieroglifaj signoj formis ideografiajn. Ĉiu ideografiaĵo konsistas el unu silabo kaj ĉiu vorto konsistas el unu aŭ pluraj ideografiaĵoj. La plej antikvaj ideografiaĵoj nun ankoraŭ troveblaj estis mulditaj sur bronzaĵoj aŭ gravuritaj sur testudŝeloj kaj bestaj ostoj por aŭgurado. En la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno, la ideografiaĵoj uzataj de la princaj regnoj estis tre malsamaj. Post unuigo de la tuta lando, Kin-dinastio unuigis la ideografiaĵojn de ĉiuj regnoj. Kaj tiam formiĝis la unuigita han-a skriba lingvo. En pli ol 2,000 jaroj post Kin-dinastio, la han-a skriba lingvo ricevis senĉesan pliriĉigon kaj pliboniĝon, sed fundamente restis evoluajo de la antikvaj ideografiaĵoj. Nun la ĉina popolo faras reformon al la hana skriba lingvo por ke ĝi fariĝu pli simpla, pli facile lernebla kaj pli oportune uzebla.

La kulturo de han-nacieco havas longan historion kaj naciajn karakterizaĵojn.


En Ŝang-dinastio, la komenca periodo de sklava sistemo, la reprezentaj personoj de kulturaj scioj estis aŭguristoj, kiuj ankaŭ scipovis muziki, danci kaj kuraci, kaj historiistoj zorgantaj pri notado de eventoj kaj personoj kaj konado de la historio. La "aŭgura" kaj "historia" kulturo de Ŝang-dinastio evoluis en filozofion kaj historian sciencon en Ĝou-dinastio. La fundamenta filozofia verko estis "Ĝouĵi", kiu resumis spertojn de aŭgurado per ok signoj kaj pristudis la filozofion

de la ŝanĝiĝoj de la naturo kaj la homa socio kaj aplikon de filozofio al politiko. Antaŭ la enporto de marksismo al Ĉinio, la diversaj filozofiaj doktrinoj de la hanoj havis rektajn aŭ nerektajn rilatojn kun "Ĝouĵi". Notado de gravaj eventoj per specialaj historiistoj fariĝis tradicio. La historiaj dokumentoj de Ŝang-dinastio estis kolektitaj en "Ŝangŝu". En la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno, ĉiu princa regno havis sian specialan historiiston. La kroniko de Lu-regno estis "Printempo kaj Aŭtuno". La kreinto de konfucianismo Konfucio ordigis antikvajn dokumentojn kaj prenis "Ĝouĵi", "Ŝangŝu", "Printempo kaj Aŭtuno", "Poemaro" (kolekto de antikvaj poeziaĵoj) kaj "Ĝouli" (pri rita sistemo) kiel klasikaĵojn kaj ilin nomis la "Kvin Klasikaĵoj". De la dinastioj Kin kaj Han, ĉiuj feŭdaj dinastioj kompilis historion de antaŭaj dinastioj. Emfazo de historiaj spertoj kaj praktikado estis karakterizaĵoj de la hana kulturo, tial la disvolviĝo de historia scienco inkluzive de politiko kaj jurisprudenco superis tiun de filozofio.

La tradicio emfazi praktikadon kontraŭstaris al religia kredo, tial la hanoj neniam havis tutnaciecan religion. En la posta periodo de Han-dinastio, la hanoj kreis sian religion taoismon, sed ĝi havis nur malmultajn kredantojn. Post kiam budhismo estis enportita el Hindio en Ĉinion, ĝi vaste disvolviĝis en Tang-dinastio (618-907 p. K.). Tiu-tempe en Ĉinio disvastiĝis ankaŭ islamo, persiaj nestorianismo (branĉo de kristanismo), zoroastrismo kaj maniĥeismo. Multaj branĉoj de la okcidenta kristanismo sinsekve penetris en Ĉinion, sed eĉ en la moderna epoko, iliaj kredantoj restis malmultaj. En la historio de la hanoj neniu reganto povis difini, per politikaj fortoj, iun religion kiel la ŝtatan religion kredendan por la tuta loĝantaro. La libero de religia kredo estas alia tradicio de la hanoj. Multaj moroj, kutimoj kaj tradiciaj festotagoj de la hanoj plejparte rilatas al la agrikultura produktado, sed ne devenis de religia kredo.

En la antikveco la hanoj okupiĝis ĉefe pri agrikulturo. Kun la disvolviĝo de agrikultura produktado,

Paperfarado en antikveco



la hanoj akiris sukcesojn en astronomio, kalendar-meteorologio, matematiko, botaniko, medicino, farmacio k.t.p., frue en la dinastioj Ŝang kaj Ĝoŭ kaj la Periodo de Prin-tempo kaj Aŭtuno. La hanoj plej frue inventis paper-faradon, presadon per presliteroj, kompason kaj pulvon. La hanoj estas ankaŭ la nacieco kiu plej frue ekspluatis kaj uzis karbon kaj petrolon. En la periodo de la dinastioj Song kaj Juan, la hanoj estis avangardaj en multaj sciencaj branĉoj de la mondo. Post la 15-a jarcento, la okcidentaj kapitalismaj landoj havis relative rapidan disvolviĝon en sciencoj kaj teknikoj. De la meza parto de la 19-a jarcento, la okcidentaj kapitalismaj kaj imperiismaj fortoj invadis en Ĉinion kaj faris ĝin duonkolonio. Pro tio la disvolviĝo de scienco kaj teknikoj en Ĉinio suferis seriozan malhelpon.

Literaturo kaj arto havis gravan lokon en la tradicia kulturo de la hanoj. La klasikaĵo "Poemaro" estis kolekto de ŝtataj kaj popolaj poeziaĵoj en la dinastioj Ŝang kaj Ĝoŭ. En la Periodo de Militantaj Regnoj aperis la elstara poeto Kju Juan. En Tang-dinastio la poezio jam disvolviĝis ĝis tia grado, ke jam formiĝis skemoj de ritmo kaj rimoj. La fame konataj poetoj Li Baj, Du Fu kaj Baj Gjuĵi ĉiuj vivis en Tang-dinastio. Multaj el iliaj poemoj havis profundan influon ĉu en ilia tempo aŭ en la postaj jarcentoj. Eĉ hodiaŭ la poetikaj skemoj de Tang-dinastio ankoraŭ estas vaste uzataj. De Tang-dinastio aperis la novaj formoj "ci" kaj "ĉju", kies versoj havas neegalan longecon kaj estas kanteblaj. En la 13-a jarcento, surbaze de "ci" kaj

"ĉju" la hanoj kreis la plej fruajn operojn. Guan Hanking, Vang Ŝipu kaj aliaj famaj dramistoj verkis multajn eminentajn operojn, kiuj estas prezentataj ankoraŭ hodiaŭ. Post la 14-a jarcento, sinsekve aperis la romanoj "Tri Regno", "Ĉe Akvorando", "Pilgrimado al la Okcidento", "Ĝinpingmeĵ" (Tri Virinoj) k. a. Fame konata tra la tuta mondo estas la romano "Sonĝo de Buduaro" verkita de Caŭ Hjukin en la 18-a jarcento. Inter la hanaj artoj kaligrafio kaj pentrarto ricevis plej vastan disvolviĝon. En la Periodo de Militantaj Regnoj, la hanoj jam inventis penikon. La uzado de peniko en skribado kaj pentrado formis originalajn kaligrafion kaj pentrarton de la hanoj. La metiarto kun longa historio estas alia floro de la hanaj artoj. Elterigitaj bronzaĵoj kaj jadaj objektoj de la dinastioj Ŝang kaj Ĝoŭ jam atingis sufiĉe altan nivelon. En la pasintaj 4,000 jaroj, la metiarto ricevis senĉesan disvolviĝon. Ankaŭ la antikva hana arkitekturo manifestis sian originalan naciecan stilon. La hanoj kaj aliaj frataj naciecoj faris inter si senĉesan kulturen interesanĝon. Ili ensorbis muzikan kaj dancan artojn de okcidentaj naciecoj kaj per tio riĉigis siajn kulturajn artojn.

La ĉina popolo alte valorigas la kulturen heredaĵon de siaj naciecoj. Direktate de Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso, la ĉina popolo kritike heredas la riĉan antikvan kulturajn heredaĵojn, forigante la feĉon kaj ensorbante la elitaĵon, por konstrui novan socialisman kulturajn heredaĵojn.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong

montris: "En la hana historio de miloj da jaroj, okazis centoj da kamparanaj ribeloj grandaj kaj malgrandaj kontraŭ la malluma regado de bienuloj kaj nobeloj. La ŝanĝoj de plej multaj dinastioj fariĝis eblaj nur dank' al la ribeloj de kamparanoj." ("La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio") En la moderna historio de Ĉinio ekde 1840, la hanoj kaj aliaj ĉinaj naciecoj kune faris popoldemokratian revolucion kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. La revolucio de 1911 gvidata de la granda demokrato Sun Jatsen renversis la feŭdisman regadon de King-dinastio kaj fondis la Ĉinan Respublikon. Sed la revolucio rapide fiaskis pro subfosado de imperiismo kaj feŭdaj fortoj. La feŭdaj militaristoj subtenataj de imperiismo denove regis Ĉinion. En 1921 fondiĝis la Komunista Partio de Ĉinio. Pere de la Unua kaj Dua Enlandaj Revoluciaj Militoj, la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Popola Liberiga Milito, la ĉina popolo sub la gvido de KPĈ kaj Prezidanto Maŭ Zedong fine renversis la reakcian regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kun Ĉiang Kajŝek kiel la reprezentanto, kaj fondis la grandan Ĉinan Popolan Respublikon en la 1-a de oktobro de 1949. La Ĉina Popola Respubliko ellaboris politikon de egaleco inter la naciecoj. La hanoj kaj aliaj pli ol 50 frataj naciecoj vivas en egaleco kaj solidareco kaj akiris brilajn sukcesojn en socialismaj revolucio kaj konstruado. Nun, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidanto Hua Guofeng kiel la ĉefo ili diligente klopodas por konstrui Ĉinion en modernan socialisman potencon.

Potala-palaco

de SUO VENKING

ĈIU, kiu unufoje vizitas Lasao, la ĉefurbon de Tibeto, senescepte estas altirata de la majesteco kaj grandiozeco de la mondfama Potala-palaco kaj de ĝia unika arkitekturo.

Kiam oni veturas tra la neĝkovritaj montetoj en la arbodensan valon de Lasa-rivero laŭ la serpentumanta vojo komencita de Gonggar-aerodromo, de malproksime li povas vidi la orajn elstarojn sur la firstoj de Potala-palaco brilantaj sub la suno kaj ĝiajn majeste altajn citadelajn murojn.

En la pasintaj kelkcent jaroj, tiu longhistoria luksa palaco de tipe tibeta arkitekturo estis la regcentro de la eklezie kaj politike unuigita reĝimo de la malnova Tibeto kaj la sidejo de ĝia feŭda loka registaro. Ĉar la Dalaj-lamaoj de pasintaj generacioj loĝis kaj plenumis religiajn aktivadojn tie, la budhanoj rigardis ĝin kiel respektindan "puran sanktejon". Ĉiutage multaj homoj venintaj de diversaj lokoj de Tibeto, pilgrimadis tien por fari kulnon. Multaj legendoj kaj belaj rakontoj pri ĝi sin trovas abunde en tibetlingvaj historiaj libroj.

Potala-palaco estis komence konstruita antaŭ 1,300 jaroj. Post kiam la unua reĝo de Tubo-dinastio de Tibeto Sunzamkampo unuigis Tibeton, li konstruigis la palacon en Lasao por edziĝi al la princino

Venĉeng de Tang-dinastio. Laŭdire, siatempe la haloj de la palaco interligis sin per ferĉenaj pontoj, kaj sur iliaj belaj firstoj staris vicoj da flagoj kaj glavoj, sed estis tre bedaŭrinde, ke tiuj fruaj konstruaĵoj plejparte detruigis pro eroziado de la jaroj. Nun konserviĝis nur la halo de Avalokitesvaro sur la plej alta loko de la palaco kaj ankaŭ modlitaj statuoj de Sunzamkampo kaj princino Venĉeng en la halo.

En la mezo de la 17-a jarcento, la kvina Dalaj-lamao estis oficiale nomita de la Centra Registaro de King-dinastio kiel la ĉefo de la eklezio kaj registaro en Tibeto. En

la jaro 1645, li ordonis mobilizi tra la tuta Tibeto ĉiutage pli ol 7,000 servutulojn por senpage rekonstrui Potala-palaco. Sur tiu bazo la postaj Dalaj-lamaoj plivastigis de tempo al tempo la palacon ĝis la nuna skalo.

Tiu grandioza konstruaĵo konsistas el du partoj: la ruĝa kaj blanka palacoj. Ĝia ĉefa domo kun 13 etaĝoj altas je 110 metroj kaj larĝas je pli ol 400 metroj de oriento al okcidento. Tiu palaco de ligna kaj ŝtona strukturo havas pli ol 15,000 ĉambrojn (kalkulitaj tibete laŭ la nombro de kolonoj), inkluzive de kultohaloj, sutroĉambroj, relikvo-

Potala-palaco



stupaaj haloj, dormoĉambroj kaj tenejoj. La palaco alte leviĝas unu etaĝo super alia laŭ la deklivo de monto Potala kaj montriĝas tre majeste. Grupo da freskoj en la Ruĝa Palaco fidele spegulas la tiamajn konstruajn scenojn: Iuj el la laborantaj servutuloj hakas ŝtonojn sur monto kaj aliaj arbojn en arbaro; kaj poste ili en longa vico transportas teron, ŝtonojn kaj lignojn al la montpinto, penante paŝo post paŝo. Lignajistoj kaj masonistoj streĉe starigas trabaron kaj masonas murojn; sennombraj flosoj el bovfelaj vezikegoj transportas konstrumaterialojn sur torenta rivero. . . Antaŭ 300 jaroj en konstruado de tiu granda palaco oni faris ĉion per la manoj. Estas imageble, ke ĉiu kolono aŭ trabo kaj ĉiu ŝtonpeco estis trempita en sango

kaj ŝvito de tibetaj laboruloj. Ĝi estis la plej bona antikva arkitekturaĵo de Tibeto kaj kristaliĝo de la sango kaj saĝo de tibetaj sklavoĵoj. Ĝia majesteco kaj beleco estas kompareblaj kun tiu de la famkonata akropolo de la antikva Ateno en Eŭropo.

Oni diris, ke Potala-palaco estas rara trezorejo de gemoj kaj oro. Tio ja estas tute vera.

Enirinte la bele ornamitajn halojn oni povas trovi, ke en ili ĉie estas trezoraj objektoj, vazoj kaj iloj por diservo kaj brilcoloraj pendrubandoj kaj tibet-stilaj pentraĵoj. Aparte menciindaj estas la artisme skulptitaj budhostatuoĵoj en diversa grandeco, kiuj sin nombras je centmiloj. Iuj el ili estas faritaj el oro kaj kupro, kaj aliaj zorgeme skul-

ptitaj el santalo kaj blanka jado. Ĉiu el ili estas gracia kaj vivsimila, tial sen trograndigo oni povas diri, ke ĉiu peco mem estas eminenta artaĵo kreita de la tibetaj artistoj en kiu kristaliĝis iliaj alta saĝeco kaj diligenta laboro. La relikvostupaaj haloj estas aparte luksaj kaj imponaj. Ĉiu stupao je dekelkaj metroj alta, tegita per oro, inkrustita per diverscoloraj perloj, jado kaj aliaj gemoj, kaj ornamita per ĉizitaj desegnoj de diversaj floraĵoj. La brilaj stupaĵoj estas uzataj speciale por konservi la relikvon de ĉiuj forpasintaj Dalajlamaĵoj. Por konstrui ilin estis bezonataj por ĉiu kelkcent kilogramoj da oro. Tio montris, kiel la tibetaj regintoj senbride suĉis la sangon de la laboranta popolo por kontentigi sian luksan kaj diboĉan vivon. Krome, en Potala-palaco konserviĝas

Sunzamkampo (Argila skulptaĵo)



Princino Venĉeng (Argila skulptaĵo)



granda nombro da libroj literaturaj, historiaj, medicinaj, astrologiaj kaj aliaj. Inter la multaj raraj budhis-
maj sutroj troviĝas unu lukse bin-
dita libro, kiu estas "Bka-gjur"
valora heredaĵo kun monda signifo,
zorgeme konservita ĉi tie de pli ol
du cent jaroj.

Potala-palaco liveras cetere vive-
can historian ateston pri la longdaŭ-
raj intimaj rilatoj inter la tibeta kaj
han-a naciecoj. Sur la muro de
galerio de alta halo estas freskoj
kiuj priskribas, kiel ministro Mgar
stong-btsan sendita de Sunzam-
kampo al Ĉang-an por bonvenigi
princinon Venĉeng kaj kiel la han-
aj metiistoj, kiujn la princino portis
kun si al Tibeto, konstruas la tem-
plon Jobo Khang. Du freskoj de
relikvostupaa halo montras la vi-
vecajn scenojn de aŭdiencoj de la
kvina kaj la dektria Dalaj-lamaoj
respektive ĉe imperiestroj Ŝunĝi
(1644-1661 p. K.) kaj Guanghju
(1875-1908 p. K.) de King-dinastio
en Pekino. Tiuj freskoj ne nur
estas valoraj materialoj por studi la
historian rilaton inter tibetanoj kaj
han-oj, sed kune kun diversaj dek-
retoj, sigeliloj kaj multaj donacaĵoj
en la palaco donitaj al la tibetaj
gvidantoj fare de imperiestroj de
Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) kaj
King-dinastio (1644-1911 p. K.)
ankaŭ forte atestas, ke de antikveco
Tibeto estas la sankta teritorio ne-
dispartigebla de Ĉinio. En la longa
historia rivero neniam rompiĝis la
intimaj rilatoj en politiko, ekono-
mio kaj kulturo inter la tibeta kaj
han-a naciecoj.



Oraj elstaraĵoj

Ekde sia rekonstruo farita de la
kvina Dalaj-lamao, la palaco staras
ĝis nun jam 300 jarojn sur la Tibeta
Altebenajo, sed en la malnova
epoko de la feŭda servuta sistemo
ĝi apartenis ne al la popolo. Tiam ĝi
estis la loko simbolanta la tiranecan
povon de dio kaj loko de terureco.
Ĝuste sub la sankta palaco troviĝis
malluma kaj humida skorpi-kaverno
en kiun sennombraj senkulpaj ser-
vutuloj kaj patriotoj estis ĵetitaj pro
atenco de la t. n. "kodo" de Dalaj-
lamaoj kaj mortis sub venena pi-
kado de skorpioj. La kruela kaj so-
vaĝa servut-sistemo estis ne plu
tolerebla por miloj kaj miloj da
homoj.

En la jaro 1959, sub firma postulo
de la tibeta popolo, la ŝtormo de la
demokratia reformo envolvis la Ti-
betan Altebenajon, kaj la kateno
de la servuta sistemo plene frakasi-
ĝis. Samtempe kun la liberiĝo de la
miliono da servutuloj, ankaŭ
Potala-palaco revenis en la manon
de la popolo.

En la jaro 1961, la Ŝtata Kon-
silantaro deklaris, ke Potala-palaco
estas envicigita inter la gravajn pro-
tektatajn lokojn de historiaj objek-
toj de la tuta lando. La Komunista
Partio kaj la Popola Registaro ĉiu-
jare asignas sumon speciale por ĝin
ripari. Nun la popola Potala-palaco
fariĝis pli bela kaj pli brila.





PRI "AKUPRESURO"

S-ro A. Uebags, esperantisto de FRG, skribis al ni montrante la diferencojn inter du libroj pri la metodo de "akupresuro", kaj li deziris informiĝi, kiu el ili prezentas la ĝustan aŭ pli bonan metodon. Laŭ peto de nia redakcio la koncerna fakulo de la Ĉina Tradicia Medicina Instituto en Pekino faris klarigon pri tiu demando. Jene aperas la ĉefa enhavo de la du leteroj de ambaŭ flankoj:

De germana esperantisto

Dum la lasta tempo oni povas ĉi-tie en Eŭropo multe legi aŭ aŭdi pri

la ĉina kuracmetodo, kiu en via lando nomiĝas "Xuewei" kaj ĉi-tie "akupresuro". Ĉar ĉi-tiu metodo ege interesis min, mi aĉetis unu libron de s-ro Bankhofer el Svislando sub la titolo "Liberigu vin de doloroj pere de akupresuro, vi nur bezonas viajn fingrojn!"

Kunparolinte pri ĉi-tiu por ni nova kuracmetodo kun amikino de mia edzino ŝi aĉetis en nia urbo Aachen ankaŭ libron pri akupresuro. Sed tute alia, ĉar la libro de Bankhofer ĉi-tie ne estas havebla. Do ŝi aĉetis la libron de la germana aŭtoro d-ro med. Frank R. Bahr el la jaro 1976 sub la titolo: "Akupresuro, sukcesa memkuracado ĉe doloroj kaj suferadoj kun akupresurbastoneto".

Leginte en ambaŭ libroj mi rimarkis, ke ekzistas inter la du libroj pri la metodo laŭ mia opinio gravaj diferencoj. En la ĉi-kuna aliĝilo vi

vidas unu ekzemplon pri la malsano "bronkito". La diferencojn mi trovis ankaŭ ĉe ĉiuj aliaj malsanoj.

Do oni estas konfuzita kiu metodo nun estas la ĝusta aŭ pli moderna. Ĉar la akupresur-metodo devenas el via lando, mi elpetas de iu ajn fakulo sur ĉi-tiu kampo, eble en viaj vicoj, prijuĝon ĉu la metodo A (Bankhofer) estas la ĝusta aŭ pli bona aŭ la metodo B (Frank).

De la Medicina Instituto

Tia kurac-metodo kiel akupunkturo aŭ akupresuro estas heredita el la longa pasinteco, kaj surbaze de sia studo kaj praktiko ĉiu el la specialistoj disvolvas sian propran, malsaman metodon, kaj konsekvence en la kuracado de la sama malsano la malsamaj specialistoj ofte elektas malsamajn "Xuewei"-ojn por apliki akupunkturaron aŭ akupresuron, tamen la efiko estas

KALETROSKOPON

Banna naskis idinon

Banna estas nomo de la elefantino, kiun oni kaptis en densa arbaro de Hiŝuangbanna per anesteza rimedo, pri ĝia deveno ni jam raportis en la 8-a numero de 1972 de EPC.

En la 14-a de junio de la kuranta jaro, post gravediĝo de 644 tagoj, Banna naskis, en Higiaŭ-parko de Ŝanhajo, idinon, kiu ricevis nomon Jina.

Ankaŭ elefantinoj, bredataj en zoologiaj ĝardenoj de Kantono kaj Pekino, jam naskis idojn, sed ili

ĉiuj estas donacitaj de amikaj landoj post dresado. La ido-nasko de Banna pruvis ke nia anestezilo



Banna kaj Jina


preskaŭ la sama, aŭ unu pruviĝas iom pli bona ol la alia. Pro la supre-dirita kialo la aŭtoroj de la du libroj menciitaj en la letero de s-ro Uebags prezentas malsamajn metodojn por la sama malsano. Povas esti, ke se oni petas konsilon de iu alia specialisto pri la sama

malsano, li proponas trian metodon de kuraco per malsamaj "Xuewei"-oj.

Aldono: Ilustraĵo kunsendita de s-ro Uebags pri malsamaj metodoj de akupresuro



A. Metodo de Bankhofer
Cirkulanta unu fingro aŭ de ekstere al interno (aktivigo) aŭ de interno al ekstero (trankviligo)



B. Metodo de Frank
Antaŭ kaj malantaŭ la korpo kombinita kun la oreloj, sed ne cirkulanta sed en unu precizigita direkto

Dekstra orelo



Maldekstra orelo



uzita en kaptado ne malhelpis la generpovon de animaloj. Tio malfermis por nia lando vojon, por laŭplane kapti rarajn sovaĝajn bestojn.

Jina naskiĝis kun pezo de 89 kg., alteco de 85 centimetroj, longeco de 82 centimetroj kaj ŝia rostro longas je 38 centimetroj. Tuj post sia naskiĝo ŝi jam povis paŝi kaj grimpi deklivon. Sub zorga flegado de bredistoj Banna kaj Jina vivas bonfarte kaj la korpa pezo de Jina kreskas ĉiutage pli ol unu kilogramon.

Jina ĉiam sekvas sian patriron. Iia amemo inter si de tempo al

tempo eksplodigis ridojn al rigardantoj.

Ĉina Gastronomio: Porkaĵo kun amando

Materialo:

Subripa viando de porko (kun haŭto) 0.5 kg.

amando	30 gramoj
riza vino	50 gramoj
malseka amelo	7-8 gramoj
zingibro (pecigita)	5 gramoj
pitita kando	50 gramoj

tubajlo (pecigita)	5 gramoj
sojosaŭco	100 gramoj
porka graso fandita	25 gramoj

Preparado:

1. Unue tranĉi la akvopurigitan viandon en kubajn pecojn kun dimensioj de 16-17 milimetroj kaj senŝeligi la amandon per trempado en bolvarma akvo. Envolvi la amandon per gazo.

2. Varmigi la porkan grason en pato sur akra fajro kaj enmeti duonon de la kando en la paton. Post kiam la kando fariĝis malhele ruĝa,

enmeti la viandpecojn en la paton kaj friti la enhavon. Kiam la viando ruĝiĝas, oni enmetas la jam pretigitajn tubaĵojn, zingibron, sojosaŭcon, vinon, akvon (sufiĉan por mergi la viandon) kaj envolvititan amandon. Kiam la akvo bolis, oni transversas la tutan enhavon en argilan poton, tiun oni metas sur malakran fajron por plua kuirado kaj de tempo al tempo kirli la kuiradojn por ke ĝi ne gliuĝu al la fundo.

3. Kiam la viando fariĝis 6-7-dekone kuirita, oni enmetas la alian duonon de la kando kaj daŭrigu la kuiradon. Kiam la viando estas naŭ-dekone kuirita, oni formovas la poton, elprenas la amandon, ĝin sternas sur la fundo de bovlo, metas sur la amandon la viandpecojn (kun haŭto malsupren) kaj enverŝas konvenan kvanton da likvaĵo el la pota. Poste oni metas la bovlon en vaporumilon, por vaporumi la viandon ĝis plene kuirita. Tiam oni renversas la bovlon por transpasigi

la enhavon en pladon. Dume oni boligas la restantan likvaĵon en la pota kaj aldonas al ĝi la amelon por formi viskozan supon, kiun oni verŝas sur la viandon en la plado. Kaj la plado estas tiam preta.

Karakterizajoj:

La tiel preparita porkaĵo aspektas sukplena kaj oleeca ruĝa, estas mole malfirma sub maĉado kaj dense bongusta kaj aromas per amanda odoro.



TERTREMORIZISTA ŜOSEA PONTO

La tertremozista ŝosea ponto super Luanhe-rivero estas finkonstruita kaj malfermiĝis al trafiko je la 1-a de julio.

La ponto longas je 979 metroj kaj situas en Luanhian-gubernio de Tangŝan-regiono de norda Ĉinio, kie jam okazis forta tertremo. Ĝi povas elteni fortan tertremon kaj havas ŝarĝkapablon de 400 tunoj.

ARTEFARITA KORVALVO

Post klopodado de 13 jaroj, la korvalvo estas sukcese farita en Ŝanhajo. La teknika ekspertizo montris, ke ĝi atingis klinikan pos-

tulon kaj longtempa uzado pruvis ĝian bonan kvaliton.

Oni faris operacion kaj instalas artefaritan korvalvon al 15 malsanuloj, kiuj serioze suferis reŭmatisman kormalsanon, stenozon kaj asistolion de dupinta valvo. Post la operacio bone resaniĝis la malsanuloj, el kiuj kvar jam revenis al sia laborposteno kaj unu sekure vivis jam 12-jarojn.

NOVAJ REKORDOJ DE ĈINAJ SPORTISTOJ

En la kuranta jaro, ĉinaj sportistoj rompis du mondajn rekordojn.

La virina arkpafa teamo de la Pekina Sporta Instituto rompis per 3,780 poentoj la mondan rekordon de 3,741 poentoj kreitan de la usona teamo en virina solronda teama konkurso en 1977. Ĉen Vejkiang, pezlevisto de la 56-kg.-kategorio, rompis per 141 kg. en konkurso kun FRG-teamo la pezlevan rekordon de 140.5 kg. de la mondaj junuloj (malpli-ol-20-jaraj).

En la sama periodo 79 landaj rekordoj estis rompita inkluzive de

21 rekordoj en naĝo, 21 en arkpafado, 16 en pezlevo, 11 en kampa kaj voja konkurso, 9 en pafado kaj 1 en sketkuro.

«VENJI BAŬ» DENOVE EN ELDONADO

Post ĉesigo de eldono de 12 jaroj, pro subfoso de la "kvarpersona bando" «Venji Baŭ», la ĉefa literatura monata revuo de Ĉinio denove aperis en la 15-a de julio ĉijare.

«Venji Baŭ» eldonata de la Federacio de Ĉinaj Literaturistoj kaj Artistoj komencis aperi en septembro de 1949. Ĝis la ĉesigo de la eldono, aperis sume 342 numeroj de tiu gazeto.

La fame konata recenzisto Feng Mu estas ĝia ĉefredaktoro.

NOVAJ LOĜEJOJ DE HARBIN EN KONSTRUADO

Harbin, la industria urbo en la Nordoriento de nia lando, ĉijare konstruas novajn loĝejojn kun plankareo de okcent mil kvadrataj metroj, kiu egalas 83% de tiu de 1966 ĝis 1975.

Laŭ la unueca aranĝo de la ŝtato kaj la postuloj de la ĝenerala plano

de la urba konstruado, Harbin grandskale konstruas loĝejojn, celante reformi malnovajn stratojn. Ĉijare la ŝtato investis ĉefe por reformi du kvartalojn koncentre loĝatajn de laboruloj. La konstruado de novaj loĝdomoj komenciĝis en marto kaj finiĝos en oktobro. Ili fariĝos novaj loĝkvartaloj de la urbo.

Krom tio, ankaŭ fabrikoj, entreprenoj kaj institucioj mem konstruas loĝejojn por siaj laboristoj kaj oficistoj.

“ENCIKLOPEDIO DE ĈINAJ KURACHERBOJ” ELDONITA

La menciita libro kompilita de la Nankina Ĉinmedicina Instituto estas la unua granda enciklopedio de ĉinaj kuracherboj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ĝi kun 10,000,000

ĉinaj ideografiaĵoj enhavas 5,767 speciojn de ĉinaj kuracherboj kaj 4,500 ilustritajn bildojn kaj ĝia unua volumo estas eldonita kaj distribuita.

Ekde la jaro 1958 oni komencis kolekti materialojn kaj kompili la enciklopedion. Ĝi fundamente resumas teoriajn sciojn kaj praktikajn spertojn de niaj medicina branĉo kaj popolanoj pri prevento kaj kuracado de malsanoj per ĉinaj kuracherboj, spegulas disvolviĝon de la ĉina farmacio kaj atingojn akiritajn en disvastigo de uzo de ĉinaj kuracherboj en la lastaj kelkaj jaroj. Ĝi liveras kompare riĉajn materialojn al la koncernaj laborantoj en kuracado, instruado kaj scienca esplorado.

La kompila laboro ricevis helpon de 21 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. En la kompilado

de tiu enciklopedio partoprenis pli ol 500 fakuloj de ĉina kaj okcidenta medicinoj, farmacio, kemio kaj aliaj flankoj.

PORDA LEVMAŝINO POR KONTENEROJ

La unua grandtipa porda levmaŝino por konteneroj de nia lando estas sukcese farita. Ĝi pezas 300 tunojn, altas 19.3 metrojn, larĝas 22 metrojn, kaj ĝia ĉefa trabo longas 44 metrojn. Ĝi povas moviĝi laŭlonge kaj laŭlarĝe kaj fari samtempe turniĝon kaj levdon. Ĝi povas levi maksimume pezon de 30 tunoj ĝis la alteco de 8.2 metroj kaj envagonigi unu konteneron en ĉ. 3 minutoj.

Prova uzado montris ke ĝi funkcias bone kaj estas konforma al la projekta postulo.



«Iom pri Esperanto». La 3-an de julio, 1978, *Renmin Ribao* (Popola Ĵurnalo), la organo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, aperigis artikolon pri Esperanto. Ĝia titolo estas «Iom pri Esperanto». La aŭtoro estas kamarado Hie Juming, laboranto de la Esperanto-Sekcio de Radio Pekino. La artikolo post sia publikigiĝo vekis ĉe nemalmultaj legantoj intereson pri Esperanto.

Eksterlandaj Esperantistoj Vizitis Pekinon. En la pasinta aŭgusto s-ino Roma Thorsen, dana esperantistino kaj ges-roj Bernard kaj Dena Frost, usonaj geesperantistoj venis unu

post la alia al Pekino dum siaj turismaj vizitoj al Ĉinio.

Kelkaj gelaborantoj de nia redakcio kaj Radio Pekino renkontiĝis kun tiuj ĉi vizitantaj geamikoj. Ni esprimis al ili varman bonvenon kaj kune kun ili pasigis ĝojan tempon en amikeca babilado.

Ni esperas, ke ĉiam pli kaj pli da eksterlandaj esperantistoj faros viziton al nia lando.

Korespondi Deziras

* Petro Patla, 20-j., dez. kor. kun ĉinaj samaĝuloj. Adr.: Skrytka pocztowa 93, 58-400 Kamienna Gora, Pollando.

* Puškaš Vladimir, 30-j., vegetarano, ŝatanto de muziko. Adr.: Voj-

vodinaput p-f. 46, YU 25001, Sombor, Jugoslavio.

* Victoria Isabela Popescu, kromencanta esperantistino, kun ĉinaj geesperantistoj. Adr.: Str. Columbelor nr. 7, ap. 1, Sector 4, 70098 Bucuresti, Rumanio.

* Slimak Zoltan, Balzakova 10, ulaz III sprat 8. stan 32, 21000 Novi Sad, Jugoslavio (18-j. junulo) kaj Klaus Laslo, Antona Urbana 8, ulaz IV stan 39, 21000 Novi Sad, Jugoslavio (18-j. junulo) dez. kor. kun gejunuloj el tm. aparte kun ĉinaj.

* Leszek Wolski, 41-205 Sosnowiec, str. Reymonta 3/19, Pollando (42-j. inĝeniero-veldisto), kun ĉinaj esp-istoj.

* Liĉina Zlatan, 21-j. studento de ekonomia fakultato, Vladimira Majakovskog 56, 24000 Subotica, Jugoslavio, kun ĉinaj gejunuloj.

Nove ricevitaj libroj

Izolo. Faksimila represo laŭ la neaperinta unua eldono presita en 1939. La aŭtoro de la poemaro d-ro Kalocsay ne bezonas rekomendon. Per tiu plaĉa volumo kompletigas la originala poemaro kun la Streĉita Kordo (1931) de tiu mult-faca verkisto Esperanta. Tre salutinda estas tiu entrepreno de UEA. La Esperanta publiko certe ĝojus, se tiu mondcentro de esperantistoj daŭrigus tiuspecan aktivadon provizitan per taŭgaj ekipaĵoj. Ŝajne reprodukto de malnovaj libroj ne bezonus tiom da kapitalo kiel produkto de novaj libroj. Sed reakireblo de elĉerpitaj valoraj verkoj estas nemalpli bonvena por la legantoj. Krome ĝi eble ankaŭ favoras finance por la mondorganizo.

La libro konsistas el 80 paĝoj kaj kostas 16.50 gld. plus 10% por sendokosto. Oni mendu ĉe UEA.

* * *

Kompleta gramatiko de Esperanto, manuskripta kopiaĵo elsendita de la aŭtoro laŭ nia peto. Do koran dankon! La verko konsistas el 50 tajpitaj paĝoj kaj estas skribita laŭ Plena Gramatiko kaj precipe laŭ *Rendszeres Esperanto Nyelvatan* de Kalocsay. La verkinto klopodis tiel aranĝi sian verkon, ke forestu

el la verko esceptreguloj kaj ke la gramatiko fariĝu kiel eble plej simpla. Tiu principo estas laŭ nia opinio tute prava. La lernantoj devas unue ekkoni la bazan strukturon de la lingvo por povi legi en la lingvo. Nur vasta legado lertigos ia lernanton kaj ebligos al li posedi la spiriton de la lingvo kaj kutimiĝi al ĝi.

* * *

Optimala ortografio de la internacia lingvo Esperanto. Per tiu detala traktaĵo la aŭtoro Albert Lienhardt volas montri kiel forigi la obstaklon, kiu estas la kaŭzo ke, ĝis nun, Esperanto ne atingis vastan tutmondan uzadon nek oficialan agnoskon fare de la ŝtataj aŭtoritatoj.



Laŭ la aŭtoro dank' al la "optimala ortografio", kiu ebligas skribi, tajpi, teletajpi, telegrafi, televidigi, komposti, presi kaj komputeri ĉiujn ajn vortojn, sciencajn terminojn kaj nomojn, nia lingvo pli facile gajnos la intereson kaj la simpatian de la intelekta kaj politika elito de ĉiuj nacioj. Tio estas la nepra kondiĉo, por sukcesigi la leĝoproponojn prezentatajn al parlamentoj kaj registaroj divers-landaj, favore al ĝenerala instruado de Esperanto en la lernejoj kaj universitatoj.


Nu, ni volus rimarkigi nur ke la neakcepton de Esperanto, laŭ ni, oni neniel povas atribui al ĝiaj ĉapelitaj literoj. Ĉu la aŭtoro vere kredas, ke Esperanto estus akceptita de tiuj grandaj eŭropaj potencoj tuj se la ĉapelitaj literoj de Esperanto estus forigitaj? Tamen, ni volonte konsentos ke forigo de tiuj ĉapelitaj literoj havus ian avantaĝojn teknike. Sed oni bonvolu konscii, ke la tuta latina alfabeto kun ĉapeloj aŭ ne estas tute novaĵo nenatura por ni orientanoj.

Ni povas sincere diri ke la tiel nomata "naturismo" en internacia lingvo estas absoluta sensencaĵo por ni unulingvanoj orientaj. Tamen per tiuj vortoj ni tute ne celas malrekomendi studojn tiurilate. Studemuloj eble trovos ion interesan en ĝi.

Prezo de la 126-paĝa traktaĵo, afrankite: 19,50 francaj frankoj aŭ 4 usonaj dolaroj. Oni bonvolu pagi per banka ĉeko al la aŭtoro (24 ave de Riedisheim, 68100 MULHOUSE) aŭ per ĝiro al la poŝta konto n° 16.233.37 PARIS de LIGUE FRANCAISE "Pro UNESCO".

La traktaĵo estas mendebla ankaŭ ĉe la libroservo de UEA en ROTTERDAM.





Langou

Langou — grava urbo de nordokcidenta Ĉinio

Teksto de VANG ŜUJEN


Fotoj de HAN SANDANG



Langou situanta sur la Loesa Altebenajo de nordokcidenta Ĉinio havas la historion de pli ol 1.600 jaroj kaj estas la ĉefurbo de Gansu-provinco, kun loĝantoj de pluraj naciecoj.


De la antikveco Langou jam estis la grava urbo de nordokcidenta Ĉinio, kiun trapasis la antikva ĉina-okcidenta arterio "Silka Vojo". Tamen en la malnova Ĉinio ĝiaj ekonomio kaj kulturo estis tre postgintaj. Antaŭ la Liberiĝo de 1949, ĝi havis nur malmultajn metiejojn, elektrejon kun kapacito de 900 kilovattoj kaj 16 malgrandajn fabrikojn de sabroj, seloj kaj litkovriloj. Oni povis veturi al ĝi per aŭtoj nur tra la du sablozaj ŝoseoj Hi-an-Langou kaj Langou-Hingiang. Tiam kameloj, ĉevaloj, muloj kaj ĉevalĉaroj estis ĝiaj ĉefaj transportiloj.


Nun Langou fariĝis trafika pivoto de la kvar fervojoj Langou-Lianjungang, Langou-Urumĉi, Baŭtoŭ-Langou kaj Langou-Hining, kies transporta



La ponto de Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-Fervojo super la Flava Rivero

La elektraĵ turoj de la Higu-a Termoelektrejo





En lanteksejo


kvanto de varoj atingis pli ol 30,000,000 tunojn ĉiujare. Krome ĝi havas multajn ŝoseojn kondukantajn al diversaj gubernioj de la provinco kaj al la najbaraj provincoj. La fervojoj kaj ŝoseoj formis trafikan reton kun Langou kiel la centro. En ĝia antaŭurbo estas moderna aerodromo, kaj pasaĝeraj aviadiloj tage kaj nokte flugas rekte al aliaj grandaj urboj.

Tie konstruiĝis unu termoelektrajo kaj tri hidroelektrajoj kun totala kapacito de 1,980,000 kilovattoj.


Dank' al la disvolviĝo de trafika kaj elektra aferoj, ankaŭ la industrio de petrolo, kemiaĵoj, petrolmaŝinoj kaj kolora metalurgio ricevis rapidan disvolviĝon kaj ludas gravan rolon.

La hotelo Amikeco (maldekstre) kaj magazeno






Produktaĵoj de la Langŝou-a Petrolra-
finejo estas transportataj aliloken.



Gelaboristoj de la fabriko de petrolkemiaj
maŝinoj en laboro

La nove riparita Bajtaŝan-parko



AHI KAJ LIAJ

PENTRAĴOJ

Fotoj de TENG MANGING




Ahi estas en pentrado.




Kato

En Linĉuan-gubernio de la Guanghai Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono troviĝas kvinjara knabo Ahi de maŭnan-nacieco. Kiam li aĝis apenaŭ kvarjara, li jam komencis lerni pentradon de sia patro. Komence li pentris simplajn pejzaĝon kaj objekton per krajono aŭ paŝtelo. Post diligenta lernado de unu jaro, li jam komencis skizon kaj faris ĉinstilajn pentraĵojn. Jen estas Ahi kaj liaj pentraĵoj.



Pejzaĝo de Gujlin





Brila Prezentado

PRI INTERNACIA GIMNASTIKA
AMIKECA INVITA TURNIRO
DE ŜANHAJO EN 1978

Ĉina virina Trabado


Rumana eminenta gimnastino Comaneci prezentas liberan grundgimnastikon.







Ĉina virina libera grundgimnastiko

Kanada sportistino en prezentado de libera grundgimnastiko




Trabado de nederlanda sportistino





Duringado de japana sportisto



Ĉevalado de rumana sportisto

VERA



1
Antaŭ longa kaj longa tempo, en Ĉinio vivis malriĉa maljunulo. Antaŭ morto li diris al sia filo Ĝang Lang: "La greno estas la plej valora, vi devas bone kulturi grenplantojn!"




2
Observante la vortojn de la patro, Ĝang Lang estis tre diligenta en terkulturado kaj ĉiujare ricevis abundan rikolton.




3
Iun tagon, kiam Ĝang Lang estis en plugado, komercisto mokis lin, dirante: "Ĉu vi konas perlon kaj agaton? Nur ili estas veraj trezoroj!" Ĝang Lang ne respondis al li.



4
Alian tagon, kiam Ĝang Lang estis en sterkado al kampo, riĉulo primokis lin, dirante: "Vi sciopovas nur kulturadon, sed ne konas, ke la oro kaj argento estas veraj trezoroj." Ĝang Lang ankaŭ ne respondis al li.



Rekado de kanada sportisto




Rekado de korea sportisto

TREZORO

Teksto kaj bildoj de KIN LONG




5
Trian tagon, kiam Gang Lang estis en sarkado, klerulo sarkasme diris al li: "Vi povosciis nur plugadon, sed ne konas, ke la libroj de sanktuloj estas veraj trezoroj." Gang Lang ankau ne respondis al li.



6
Poste, en elmontrado de trezoroj, la komercisto laudadis siajn perlojn kaj agatojn, la riĉulo siajn oron kaj arĝenton kaj la klerulo siajn librojn.



7
Prezantante oran kukon kaj tritikajn spikojn Gang Lang diris: "Tio ja estas vera trezoro!"



8
Aŭskultinte tion, maljunulo ekĝojis kaj edzinigis sian filinon al Gang Lang. Kaj ili kune revenis al la monto por daŭre kulturi grenplantojn.



8156